

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

10

1975






Konduki akvon tra montoj (novjara bildo)




# Novaj sukcesoj de ŝanhaja industrio


Novaj maŝinoj estas ekzamenataj en la Unua Kemimaŝina Fabriko de Ŝanhajo.



La produktokvanto de la Tria Stal-fabriko de Sanhajo en la unua duono de la kuranta jaro pliiĝis je 8.94 procentoj ol tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Jen elektra forno de ĝia dua laborejo estas en elfluado de stala likvaĵo.










La 10,000-tuna hidraŭlika premaŝino de la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko forĝas rotoron de granda generato.

La Ŝanhaja Dua Fabriko de Aŭtoakcesoraĵoj projektis kaj fabrikis mult-pozician premaŝinon por produkti aŭtolampan korpon. La transporta procedo estas farata tute de maŝinmanoj, kio kvinonigis la produktan tempon kaj sep-ok-obligis la produktivon.










Globaj oksigenujoj kun diametro de 6.1 metroj faritaj de la Maŝin-fabriko Hingian de Ŝanhajo



Sanhajo fabrikis nombrojn da novaj medicinaj aparatoj. Jen estas kora-pulma maŝino taŭga por infanoj



# Reformo de ĉinaj lokaj operoj

**K**UN sia vasta teritorio kaj multaj naciecoj, Ĉinio havas tradician operarton tre kolorriĉan. Krom la pekina opero ekzistas ankaŭ multspecaj lokaj operoj kaj preskaŭ ĉiuj nacimalplimultoĵoj havas sian tradician operarton.

En sia longa labora vivo, niaj diversnaciecaj laborantaj popolanoj kreis riĉajn popolajn literaturon, muzikon k.a., surbaze de kiuj formiĝis kaj disvolviĝis la lokaj operoj. Tiuj operoj estas kantataj plejparte en dialektoj aŭ lingvoj de nacimalplimultoĵoj, intense odoras je loka vivo kaj aparte plaĉas al sia lokaj amasoj.

Ĉiu el la ĉinaj lokaj operoj, ĉu vaste konata aŭ ne, havas sian propran historion de disvolviĝo. Iuj el ili jam havas historion de kelkcent jaroj, dum aliaj formiĝis en la lastaj 10 aŭ 20 jaroj, kvankam la melodioj aplikitaj en ili cirkuladis inter la popolanoj jam delonge. Pro tio, ke la lokaj operoj cirkulas en certa tereno, ĉiu el ili havas sian propran karakterizaĵon. La *bangzi*-operoj ludataj en norda kaj centra Ĉinio karakteriziĝas per nepolurita kaj larĝmaniera gestado kaj alttona kaj forta muziko. Kaj krome oni povas konstati, ke la *bangzi*-oj de Hebej, Henan, Ŝandong kaj Ŝanhi diferencas unu de alia je siaj arioj kaj la uzataj dialektoj pro tio, ke ili cirkulas en malsamaj distriktoj. En iuj lokoj ekzistas samtempe pluraj specoj de lokaj operoj kaj en iuj provincoj ilia nombro atingas eĉ dekojn. Kaj enhance kaj forme la diversaj specoj de lokaj operoj influas unu alian.

Iuj en la centoj da lokaj operoj aktivas ne nur sur scenejoj de sia cirkula regiono, sed ankaŭ havas certan influon en aliaj lokoj. Inter tiaj sin trovas la *bangzi*-oj kaj *pingĝju* de norda kaj nordorienta Ĉinio, *ĉinĉiang* de nordokcidenta Ĉinio, *ljuĝju*, *jueĝju* kaj *huangmej* de orienta Ĉinio, *hanĝju* kaj *huagu* de centra Ĉinio, *ĉuangĝju* kaj *gujĝju* de sudokcidenta Ĉinio kaj la *guangdong*-a opero. Inter la nacimalplimultaj operoj relative vastan agadkampon havas *ĝuangĝju*, *dungĝju*, *mjaŭĝju*, *dajĝju*, tibeta opero kaj ujugura opero. Iuj operoj de nacimalplimultoĵoj estas formitaj sub la zorgo de la Komunista Partio de Ĉinio post la Liberiĝo. Ekzemple *bajĝju* ĝuste formiĝis surbaze de du specoj de popolartoj de baj-nacieco en Junnan post la Liberiĝo.

La buntaj lokaj operoj estas valorega riĉaĵo de la ĉinaj tradiciaj kulturo kaj arto. Sed pro la malrespekto kaj tretado de la ĉinaj reakciaj regantaj klasoj de diversaj periodoj, multaj lokaj operoj ne povis sane disvolviĝi, iuj agoniis kaj aliaj estis utiligataj por propagandi superstiĉojn kaj malnovajn moralojn por trompi kaj narkoti la vastajn popolamasojn. Post la Liberiĝo, kvankam la lokaj operoj ricevis certajn disvolviĝon kaj altiĝon, tamen pro la regado de la reviziisma literatura kaj arta linio antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, la malnovaj lokaj operoj, same kiel la malnova pekina opero, per plejparto de sia repertuaro priskribis imperiestrojn, reĝojn, generalojn, ministrojn, dandojn kaj belulinojn kaj en arto senŝanĝe kopiis malnovajn formulojn kaj ariojn.



Sceno el la uigura opero "La Ruĝa Signal-lanterno" ludata de la Hingiang-a Opera Trupo

## LAŬ LA EKZEMPLOJ DE LA REVOLUCIAJ MODELAJ TEATRAĴOJ

Antaŭ 11 jaroj, sub la gvido de la proletara revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, nombro da revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj faris revolucion, antaŭ ĉio, al la pekina opero kaj kreis nombron da novaj verkoj brilantaj je spirito de la proletaro. Ili forpelis, de sur la scenejo, la gesinjorojn kaj gesinjoridojn, kiuj longe okupadis la scenejojn, kaj starigis heroojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur la scenejo kiel la ĉefajn. Tiuj verkoj estas nomataj en nia lando revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj ili estas modeloj de la socialismaj literaturo kaj arto.

La revoluciaj modelaj teatraĵoj priskribas la batalan vivon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tial ili estas varme akceptataj de la vastaj popolamasoj, iliaj rakontoj vaste cirkulas inter la amasoj kaj la herooj en ili fariĝis lernindaj ekzemploj por la popoloj. Kaj la popolamasoj de ĉiuj lokoj deziras, ke ankaŭ la lokaj operoj ŝatataj de ili prezentu tiajn novajn heroojn kaj pensojn. Sed la

tradiciaj arioj, melodioj kaj mimiko de la lokaj operoj estas tre malvaste limigitaj por esprimi la batalan vivon en la revoluciaj jaroj. Ekzemple la teatraj trupoj de *jueĝju* cirkulanta en Ŝanhajo, Ĝegiang kaj Giangsu de orienta Ĉinio havis, en la pasinteco, nur aktorinojn, kiuj devis ludi ankaŭ virajn rolojn, kaj ĉiuj arioj de tiu opero estis molaj kaj mildaj aŭ plenaj de spleno kaj ĉagreno. Estas malfacile por tiu opero prezenti modernajn temojn, se oni ne reformas ĝin. Tial fari revolucionan reformon al la diversaj artaj rimedoj de la lokaj operoj fariĝis urĝa postulo de la vastaj amasoj.

En kreado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj, revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj faris radikalan reformon al la malnova pekina opero k.a. teatraj artoj kaj akiris riĉan sperton en praktiko de la principo "**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio**" kaj "**forigi oldajn por elvolvi novajn**" por atingi "**unuigon de revolucia politika enhavo kaj laŭeble plej perfekta arta formo**". La diverslokaj laborantoj de lokaj operoj serioze lernis la



sperton en kreado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj komencis serĉi vojon por reformo de lokaj operoj en adaptado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj. La praktikado en la pasintaj kelkaj jaroj pruvis, ke tio estas taŭga vojo por reformado de la lokaj operoj. Nun multaj lokaj operoj jam akiris ĝojindajn sukcesojn en adaptado de revoluciaj modelaj teatraĵoj. Pri tio la ujugura opero *La Ruĝa Signal-lanterno*, adaptita de la samtitola revolucia moderna pekina opero kaj ludita lastatempe de la Opera Trupo de la Hingiang-a Ujugura Aŭtonoma Regiono en Pekino, donas bonan ekzemplon.

Prenante certajn ariojn de la ujuguraj tradiciaj melodioj “Dek Du *Mukam*-oj” kiel materialon kaj post reformo kaj disvolvo de ili, la verkintoj de la ujugura opero *La Ruĝa Signal-lanterno* sukcese aranĝis la muzikon de la opero kaj modlis muzikajn figurojn de proletaj herooj.

La “Dek Du *Mukam*-oj” estas valorega muzika riĉaĵo de la ujugura laboranta popolo de nia lando. Ĝi enhavas abundon da arioj kaj tre variajn melodiojn kun elstaraj naciaj karakterizaĵoj. Multaj pecoj de ĝiaj muzikaĵoj esprimas la akuzon kaj kontraŭstaron de la ujugura laboranta popolo kontraŭ la malnova mondo. Sed pro la historia limigiteco kaj tuŝaĵoj faritaj de la ekspluatantaj klasoj al ĝi, ĝi entenas ankaŭ nemalmulte da skorio kaj malsanaj elementoj. Tial estas necese fari elektadon kaj reformon al ĝiaj muzikaĵoj por ilin uzi hodiaŭ en prezentado de la revolucia batala vivo de la proletaro.

Literaturaj kaj artaj laborantoj de la Hingiang-a Ujugura Aŭtonoma Regiono lernis la sperton de la revoluciaj modelaj teatraĵoj pri kritika heredo kaj reformado de tradiciaj artoj, analizis la tutan muzikon de la “Dek Du *Mukam*-oj” kaj elektis el ĝi materialojn konformajn al la karakteroj de la herooj en *La Ruĝa Signal-lanterno* kiel tonalojn de la herooj post reformo. Ekzemple la tonalo por la ĉefa heroo Li Juhe estas verkita surbaze de materialo el la kanto *Muŝaŭrek* kun rela-

tive alta tonalo kaj vasta skalo. Surbaze de tiu tonalo, la komponistoj klopodis verki ariojn kiuj povas precize, klare kaj vive prezenti la pensojn kaj sentojn de la heroo kaj aparte atentis verkadon de serio da variaj arioj por la ĉefa heroo, precipe tiun de la kerna ario de Li Juhe.

Kaj krome, oni ankaŭ elektis kaj aplikis popolkantojn de sia regiono por riĉigi la ariojn

*Sceno el la revolucia moderna jueĝju-opero “Duonkorbo da Arakidoj”*



*Sceno el “Ruĝa Umefloro sur Cangŝan-monto” ludata de la Baj-opera Trupo de la Dalia Baj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Junnan*



de la ujugura opero *La Ruĝa Signal-lanterno*. En verkado de la kerna ario de Li Juhe, oni alprenis belan melodion kun delikataj nuancoj el jili-a popolkanto de Hingiang kaj aranĝis lirikan kaj klaran adaĝon por priskribi la altan revolucionan idealon de Li Juhe. En la tonalon de la heroino Li Tiemej oni enmiksas gajajn tonojn de ujugura popolkanto por elstarigi ŝian vervoplenan karakteron. Samtempe, en la opero oni ankaŭ aplikis certajn rimedojn de la pekinopera muziko kaj la esprimajn rimedojn de ĥoraĵo, akompana kanto kaj dancoj kaj kunfandis ilin kun la muziko de *mukam*-oj.

Dank' al zorgema rearanĝo kaj reformo, la esprimpovo de la ujugura opero multe pliriĉiĝis. La ujugura opero *La Ruĝa Signal-lanterno* verkita tiamaniere manifestas relative bone la revolucionan spiriton de la pekinopera originalo kaj enhavas intensan koloron de *mukam*-muziko, kaj unuiĝo de la epoka spirito kaj la aparta karakterizaĵo de la koncerna opero estas atingita en relative alta grado. La sukcesa adapto liveris valoran sperton por riĉigi kaj disvolvi la tradiciajn operojn kaj muzikon.

*Aktoj de Ulanmuĉi de la Unuiĝa Flago de Centra kaj Malantaŭa Urad de Bajannur-ligo prezentas fragmenton el "La Ruĝa Signal-lanterno" al paŝtistoj en ilia jurto.*



En la lastaj jaroj, ankaŭ multaj aliaj lokaj operoj de Ĉinio estas reformitaj kaj disvolvitaj en adaptado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj. La *huagu*-opero de Hunan estas alia relative elstara ekzemplo pri tio. Dum sia ekzistado de pli ol 200 jaroj, tiu opero prezentis ĉefe familiajn bagatelojn, ĝiaj arioj kaj taktaranĝoj estis malriĉaj kaj la kantado frivola. En adaptado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj, literaturaj kaj artaj laborantoj de Hunan-provinco verkis multajn novajn ariojn kiuj ne nur konservas la klarecon de la *huagu*-opera muziko sed ankaŭ povas relative bone modli muzikajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj pro alteco kaj forteco en sia tono. La renovigo de la muziko de *huagu*-opero akcelis la reformon de la verkado de ĝiaj teatraĵoj, mimikado, reĝisorado kaj dekoraciado. Kaj kun tute novaj aspektoj la nuna *huagu*-opero de Hunan estas varme akceptata de la popolamasoj de tiu provinco.

#### SUB FLEGADO DE LA AMASOJ

La reformado de la lokaj operoj de Ĉinio ĉiam iradas sub la gvido de diversnivelaĵ par-

*Sceno el la juĝju-opera adaptaĵo "Rododendra Monto" ludata de la Juĝju-opera Trupo de Janling-gubernio de Henan-provinco en kamparo*





tiaj organizoj kaj la subtenado de vastaj popolamasoj. La verkistoj kaj aktoroj de lokaj operoj ofte vizitas fabrikojn, komunumojn kaj trupojn de ĈPLA kun siaj adaptitaj kaj verkitaj teatraĵoj por peti opiniojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La amasoj tre zorgas la reformon de lokaj operoj kaj elmetis al ili multajn opiniojn pri la artaj aranĝoj. Iuj gravaj kantoj de la ujugura opero *La Ruĝa Signal-lanterno* estas plibonigitaj laŭ la proponoj de amasoj. Iu pekina laboristo verkis arion en postlaboraj horoj kaj sendis ĝin al la Pekina Hebej-bangzi-a Trupo, kiu estis faranta adaptadon kaj prezentadon, kaj per tio helpis la nomitan teatran trupon.

Sub la zorgado kaj kuraĝigado de la amasoj, la centoj da ĉinaj lokaj operoj ricevis diversgradajn disvolvон kaj renovigon en muziko, kantado, mimikado, parolo kaj dancado, en adaptado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj. Eĉ multaj naciaj muzikiloj estis reformitaj kaj nemalmultaj operaj trupoj fondis miksan orkestron de okcidentaj kaj ĉinaj muzikiloj kun la lastaj kiel la ĉefaj.

En la revolucio de la pekina opero, nombro da revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj estas harditaj kaj elkulturitaj. Kaj en la reformado de lokaj operoj iom post iom fondiĝis kaj disvolviĝis revolucia trupo de lokaj operoj. Verkistoj kaj aktoroj de lokaj operoj lernas la noblajn pensojn kaj moralojn de la herooj en adaptado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj profundiĝas en la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por reformi sian mondkoncepton. En la vicaro de lokaj operoj aperis viveplena prospero, dank' al solidara kunlaboro kaj interhelpado inter la novaj kaj malnovaj artistoj. Hong Hiannju, malnova aktorino de la guangdong-a opero sukcese modlis la figuron de sagaca kaj kuraĝa kompartianino Bofranjo Aking en adaptado de la pekina opero *Ŝagiabang* kaj faris novan kontribuon al la reformo kaj disvolvado de la guangdong-a opero. Hong Hong, filino de Hong Hiannju

ludis la ĉefrolon Ke Hiang en la guangdong-opera adaptaĵo *Rhododendra Monto*. Parolante pri la fenomeno, ke oni korodis aktorojn per gloro kaj mono sub la regado de la reviziisma literatura kaj arta linio, ŝi diris: "Ke Hiang direktas sian rigardon al la gravaj aferoj de la mondo kaj tenas la instrukcion de la Partio en la koro, ĉu ni devas ĉasi gloron kaj monon kaj postuli multan pagon de la popolo!" Kune kun la kamaradoj de la opera trupo ŝi aktive partoprenis en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj iris en kadran lernejon de "la 7-a de majo" por ricevi reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj komencis sian novan artistan vivon en la revolucio de la guangdong-a opero.

Stimulate de la revoluciaj modelaj teatraĵoj, trupoj de lokaj operoj kreis en la lastaj jaroj nemalmultajn novajn teatraĵojn spegulantajn la aktualan vivon. En majo de la kuranta jaro sur pekina scenejo oni ludis ampleksan bajĝju-operon *Ruĝa Umefloro sur Cangŝan-monto*, kiu temas pri "nudpieda" kuracistino de baj-nacieco, kaj ricevis laŭdojn de literaturaj kaj artaj laborantoj kaj popolamasoj de nia ĉefurbo. En adaptado de la opero *Spirito de Longgiang* oni alprenis alttonan melodion de ĝegiang-provinca popola kanto por vira voĉo en jueĝju-opero, kiu antaŭe tute ne havis virojn kiel aktorojn kaj la nova jueĝju-opera verko *Duonkorbo da Arakidoj* pri filozofia studo de kamparanoj eĉ estas filmigita kaj prezentita tra la tuta lando.

Lastatempe en Pekino okazis festivalo de lokaj teatraĵoj de nombro da provincoj kaj municipoj. Konsiderinda nombro da lokoperaj adaptaĵoj de la revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj nove verkitaj operoj estas luditaj. Ili estas elektitaj el granda nombro da teatraĵoj ludataj en diversaj lokoj. La ĉinaj lokaj operoj ricevis novan vivon en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj hodiaŭ ĉarme brilas en la ĝardeno de socialismaj literaturo kaj arto.



*Han Kihang kantarokontas en Zaijuan.*

# Servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj dum la tuta vivo

HAN KIHANG

**M**I estas blindulo-rakontisto kaj havas aĝon de 61 jaroj. En majo de la kurlanta jaro mi venis al Pekino por fari kantarokontadon de norda Ŝenhi-provinco, kio tre emociis min. Veninte al Pekino, kie loĝas Prezidanto Maŭ, mi nature rememoris mian travivaĵon antaŭ 29 jaroj, kiam Prezidanto Maŭ aŭskultis mian rakontadon.

Tio okazis en aŭgusto de 1946. Prezidanto Maŭ sendis, por ke mi iru al Janggialing por rakontado. Tiam mi tiel emociiĝis, kiel hodiaŭ. Mi rapide surmetis novajn vestojn kaj rapidis al la Centra Halo de Janggialing. Pro blindeco mi ne povis vidi, kie sidas Prezidanto Maŭ. Subite eksplodis tondra aplaŭdo kaj mi aŭdis, ke oni akklamis Prezidanton Maŭ, kaj ankaŭ mi stariĝis kaj plaŭdis per la manoj. Prezidanto Maŭ iris al mi, firme premis mian manon kaj vokis mian nomon frapante al mi la ŝultron. Kiel feliĉe

estus, se mi havus vidpovon por detale rigardi Prezidanton Maŭ. Prezidanto Maŭ sidiĝis kontraŭ mi kaj aŭskultis mian rakontadon. Post la aŭskultado Prezidanto Maŭ denove firme premis al mi la manon, pride mandis mian vivon kaj lernadon kaj kuraĝiĝis min, ke mi pli multe verku rakontojn pri laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj prezentu ilin.

En la pasintaj jaroj depost tio, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, mi klopodis por verki rakontojn pri laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj prezenti ilin. Pro mia malgranda kontribuo la Partio kaj la popolo multe honoris min. Estas alia granda kuraĝigo al mi, ke ĉifoje mi havis ŝancon por prezenti al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de la ĉefurbo Pekino.

En 1940 mi forlasis mian hejmlokon Hengŝan-gubernion en la norda parto de Ŝenhi



kaj venis al Jan-an. Inter Jan-an kaj Hengŝan troviĝas nur unu monto, sed ili prezentis tute malsamajn mondojn. Jan-an estis mondo de laboruloj gvidataj de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, tie la armeo kaj la popolo unuiĝis kiel unu homo kaj ĉie aŭdiĝis kantoj pri rezisto kontraŭ la japanaj agresantoj. Por fiaskigi la blokadon de kuomintangaj reakciuloj kontraŭ la limregiono de Ŝenhi, Gansu kaj Ninghia, la armeo kaj la popolo de la limregiono disvolvis la ardan kampanjon de produktado. Ili venkis malfacilojn kaj ekhavis vivon kun sufiĉaj vestaĵoj kaj manĝaĵoj. Mi volis prikanti la feliĉan vivon al la amasoj, sed mi ne havis tekston. Poste mi akiris de iu soldato *Rimitajn Sentencojn kontraŭ Japana Agreso*. Mi kantis la tekston al la amasoj kaj tiuj kontente diris, ke mia kantorakontado kun nova enhavo estas bona, ĉar ĝi temis pri kurantaj aferoj kaj estas tre eduka.

En majo de 1942 Prezidanto Maŭ publikigis sian verkon *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, kiu estas lumturo por ni kulturaj kaj artaj laborantoj. La superuloj tuj asignis iujn por helpi min en lernado de la verko. Ili voĉlegis por mi la verkon alineon post alineo kaj mi avide ensorbis ĉion legitan. **“Ĉiuj revoluciaj literaturistoj kaj artistoj, ĉiuj multpromesaj literaturistoj kaj artistoj en Ĉinio, nepre devas iri en la amasojn, nepre devas iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kampanojn kaj soldatojn, en la ardan batalon, en la solan, plej vastan kaj plej riĉan fonton por observi, trasperti, studi kaj analizi ĉiajn personojn, ĉiajn klasojn kaj ĉiajn amasojn, ĉiajn vivecajn formojn de vivo kaj batalo kaj ĉiajn krudajn materialojn de literaturo kaj arto. Nur post tio ili povos transiri al krea laboro.”** Prezidanto Maŭ diris ankaŭ, ke **“Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj nepre devas plenumi tiun ĉi taskon, ŝanĝi sian starpunkton kaj iom post iom transigi ĝin al la flanko de laboristoj, kampanoj kaj soldatoj, al la flanko de proletaro”**. La instruoj de Prezidanto Maŭ profunde edukis min. Mi estas blindulo-rakon-

tisto vivinta dekojn da jaroj en la malnova socio kaj ankaŭ mi devis ŝanĝi miajn pensojn, sentimentojn kaj starpunkton por krei novajn rakontojn. De tiam mi iris en la kampanon kunportante trikordon\* kaj tie vivis, lernis kaj laboris kune kun la amasoj. Post certa tempo mi sciigis pri multaj bonaj homoj kaj bonaj aferoj kaj komencis verki novajn tekstojn pri ili. Ĝis 1946 mi verkis plurajn novajn tekstojn por rakontado, kiel ekz. *Kurantaj Aferoj kaj Voĉdono de Ĝang Julan*. Prezidanto Maŭ vid-al-vide kuraĝigis min pli multe verki tekstojn de rakontado pri laboristoj, kampanoj kaj soldatoj kaj ilin prezenti, kio multe klarigis mian penson.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 mi komencis disiĝi disde la arda batala vivo de la amasoj pro multeco de miaj sociaj aktivadoj, mi verkis malpli multe kaj la verkoj ne estis bonvenaj al laboristoj, kampanoj kaj soldatoj. Mi vidis iom post iom, ke tio rezultis el la disiĝo disde la popolo. Tial mi rezolute petis permeson reveni en la kampanon. En 1953 mi revenis al Jan-an kaj ekloĝis en la vilaĝo Janglaŭĝuang, 25 kilometrojn distance de Jan-an. Ĉi tie mi laboradis kune kun malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, starigis kune kun ili agrikulturan kooperativon kaj poste popolan komunumon. Kaj mi verkis rakonton pri la batala vivo de la amasoj. *Nova Fizionomio de la Vilaĝo Janglaŭĝuang, Giganta Ŝanĝiĝo de Montvalo* k. a. pli ol 100 verkaĵoj estis kreitaj de mi en la vilaĝo.

Pro manko de instruiteco kaj vidpovo estis tre malfacile por mi verki tekstojn de rakontado, kaj en lernado mi devis peti aliajn voĉlegi por mi. Poste mi informiĝis, ke troviĝas brajlo, kaj mi volis lerni ĝin. En vintro de 1956, partoprenante kunvenon en Pekino, mi ellernis la brajlon per 40 tagoj. Nun mi povas legi, verki, skribi leteron kaj fari notojn en kunveno. La *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* de Prezidanto Maŭ estas lumturo por miaj kreado, vivo kaj reformado de ideologio kaj mi devas senĉese lernadi ĝin. Ĝis nun mi jam eluzis 4 ekzemplerojn de la verko pro ripetada

legpalpado. Kiel intimaj kaj profundaj estas la instruoj!

En 1957 mi venis al Goŭmen por koni la vivon de la tieaj loĝantoj. Tiam burĝaj dekstruloj en la urboj furioze ekatakis la Kompartion. Responde tion aĉulo en la vilaĝo kalumniis, ke la nova socio estas malpli bona ol la malnova. Mi forte indigniĝis pro tio kaj nature rememoris la amaran pasintecon:

Ekde mia avo miaj familianoj laboris kiel dungitoj por bienuloj. Ni vivis en malsato kaj molestado kaj la suferoj estas ne finrakontebaj en dek tagoj. En la aĝo de 3 jaroj mi suferis de variolo kaj blindiĝis pro manko de monrimedo por kuraco. Kiam mi estis 8-jara, pro ŝuldo al bienulo mi estis devigita labori kiel lia muelilturnisto. Mi senĉese iradis ĉirkaŭ la muelilo puŝante ĝian tenilon. Pro malsato kaj laciĝo mi ofte sentis kapturniĝon. Se mi tempeton ripozis, la lakeo de la bienulo tuj vipis min solide. En la aĝo de 13 jaroj mi forfuĝis de la bienulo kaj fariĝis rakontisto. Tiam en norda Ŝenhi-provinco okazis sekegeco kaj eĉ la arboŝeloj kaj herboradikoj estis formanĝitaj de malriĉuloj. Ne plu povante vivteni la familion, miaj gepatroj vendis mian fratinton kaj ankaŭ mi fariĝis almozulo. En malesperego mi aŭdis, ke Prezidanto Maŭ, la savanto de ni malriĉuloj, venis al Jan-an kun la Ruĝa Laborista-Kampana Armeo sub sia gvido. Riskante la vivon mi kaj mia familio iris al Jan-an kune kun pli ol 30 kampanaj familioj. Kaj de tiam ni havas feliĉan vivon. Ĉu la nova socio estas multe pli aŭ malpli bona ol la malnova socio, mi havas klaran kalkulon.

Mi do verkis novan kantorakonton pri la amara historio de mia familio kaj la feliĉa vivo en Jan-an. Kun la arta armilo mi ĵetis min en la batalon kontraŭ la burĝaj dekstruloj.

En la sekvanta jaro mi speciale vizitis mian hejmlokon en Hengŝan. Tie popola komunumo estis jam starigita kaj la fizionomio tute ŝanĝiĝis. La komunumanoj reformis la

grundon kaj akiris bonan rikolton. Ĉiuj domoj de la vilaĝo ekhavis elektran lampon. El tio naskiĝis mia nova teksto por rakontado *Mia Hejmvilaĝo*. En la kultura revolucio mi duafoje vizitis mian hejmvilaĝon kaj vidis ŝanĝiĝon ankoraŭ pli grandan. La produktaj taĉmentoj havas traktorojn kaj grenon en rezervo. Tio rememorigis al mi la vivaĉon de malsato kaj frostoj en la malnova socio kaj kun granda emociiĝo mi reviziis la rakontan tekston *Mia Hejmvilaĝo*.

La Granda Proleta Kultura Revolucio refoje donis al mi profundan edukon. La ĝojiga sukceso de la kultura revolucio kuraĝigas min daŭre kaj senkondiĉe fondiĝi en la amasojn de laboristoj, kampanoj kaj soldatoj, verki kaj prezenti por ili. Mi ofte laboras kune kun kampanoj kaj faras kion mi povas, ekz. ŝoveli teron, forigi involukron de maizo . . . kvankam min ĝenas la blindeco. Dum ripozo mi kantorakontas por komunumanoj. Ili diris, ke mia rakontado multe entuziasmigis ilin. Mi rigardis tion kuraĝigo kaj subteno al mi. En la lastaj jaroj ekde 1970 mi verkis pli ol 40 novajn tekstojn por rakontado. En 1973 mi venis al iu konstruata akvorezervejo por fondiĝi en la amasojn. La minado de rokoj sur la konstruejo, la intensa laborado de la energiaj konstruantoj, la propagando pri avangardaj konstruantoj en megafono, forte agitis min. Laboron bezonantan iradon mi ne povis fari pro la blindeco, do mi fosadis. Mi intervjuis pionirajn konstruantojn kaj priskribis ilin en miaj tekstoj por rakontado en megafono. Mi skribis *Avo Jan Vizitas la Akvorezervejon Vangjaŭ*, kiun mi prezentis ĉe la mitingo celebranta la antaŭdatan plenumiĝon de la konstruado de la granda baraĵo. La rakontado havis jenajn frazojn:

*Jan-anaj popolanoj translokigas grandan monton,  
kaj aerskuaj mineksplodoj tondras nun sen ĉeso.*

*Rokegoj dispeciĝis kaj foriĝis same kiel la Hu Zongnan-a\*\* banditaro en la pasinteco.*

. . .



Por profundiĝi en la realan vivon, mi devas utiligi mian aŭdadon kaj palpdon. Foje mi informiĝis de komunumanoj, ke oni kreis kampojn sur montodeklivo en 42 ŝtupoj, sed tio impresis min nebule. Mi do iris tien, grimpadis supren kaj malsupren palpante. En la ŝtuparaj kampoj milio, sorgo kaj kotono kreskis prospere kaj mi skribis jenajn versojn: “Nun disvolvante la revolucian tradicion, Jan-an-aj popolanoj laboregas energie. La ŝtuparkampoj ĉiuj portas oron kaj arĝenton, socialismajn trezorejojn ni ja havas ĉie.”

En la pasintaj pli ol 30 jaroj mi ĉiam tenis kontakton kun la kamparo. Mi amas la kamparon kaj la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Mi intime amikiĝis kun ili. Mi decidis esti ilia fidela proparlanto dum mia tuta vivo. Tiu profunda klasa amo havigis al mi vivecajn kaj riĉajn materialojn por verkado. Kiam mi forestis de Janglaŭĝuang iom longe, la vilaĝanoj ofte

sopiris min. Veninte al Jan-an, iuj komunumanoj vizitis min kaj rakontis ĉion en la vilaĝo, eĉ naskiĝon de filo aŭ filino al ies edzino. Kiam mi revenis al la vilaĝo, infanoj tuj rapidis al mi kaj tiris min je la mano, kaj la vilaĝanoj kriis demalproksime: “Hanĉjo revenis!”

Prezidanto Maŭ diris: “**En la mondo tute ne ekzistas senkaŭza amo nek senkaŭza malamo.**” Mi ofte pensas, ke sen la popola revolucio gvidata de Prezidanto Maŭ, ne estus la hodiaŭa vivo. Mi jam estas 61-jara, sed ankoraŭ sana, kaj mi ankoraŭ povas lerni de kaj servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en miaj restaj jaroj.

\* *Trikorda plukmuzikilo.*

\*\* *Reakcia militaristo de Kuomintango. En 1947 lia trupo atakis la limregionon de Senhi, Gansu kaj Ninghia kaj estis peze punita de la Popola Liberiga Armeo.*



### ALIA OLEODUKTO DE ĈINIO

En junio ĉijare finkonstruiĝis kaj ekfunkciis la oleodukto de Kinhuangdaŭ ĝis Pekino. Laŭ tiu oleodukto nafto de Daking senĉese fluas en la Petrolrafinan Fabrikon Dongfanghong de Pekino, kie diversaj bonkvalitaj petroloj estas produktataj kaj poste oni transportas ilin per trajnoj al diversaj lokoj de nia lando.

La nova oleodukto estas etendaĵo de la oleodukto de Daking-petrolkampoj ĝis Kinhuangdaŭ. Ĝi trapasas 13 urbojn kaj guberniojn de Hebej-provinco, Tiangin kaj Pekino kaj pli ol 100 riverojn, fervojojn kaj ŝoseojn kaj longas 355 kilometrojn.

Ĝia konstruado komenciĝis en majo de 1974 kaj venke plenumiĝis en 13 monatoj sen ĝeno al agrikultura produkto.

### JANGĜOŬ FABRIKIS X-RADIAN APARATON TAŬGAN POR UZADO EN KAMPARO

La Jangĝoŭ-a Fabriko de Medicinaj Aparatoj de Giangsu-provinco sukcese fabrikis centmiliamperan X-radian aparaton, kiu estas oportuna por uzado en bazaj kuracaj unuoj de kamparo, fabrikoj kaj minejoj. Kompare kun la ducentmiliampera X-radia aparato uzata en ordinaj hospitaloj de nia lando, ĝi estas pli simpla, pli facile muntebla, riparebla kaj manipulebla, kaj pli malmulte kosta. Praktika uzado pruvis, ke la aparato taŭgas por fari ne nur X-radian esploron kaj foton al relative dika parto, sed ankaŭ fotojn al difinitaj partoj de stomako aŭ intesto kaj por fari kontrastan radiografion.



## “Teatra trupo kun portvektoj”

TIAN GIAN

**D**ANK’ al la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, multaj novaj socialismaj aferoj, ekz. “nudpiedaj kuracistoj”, kadrolernejoj de “la sepa de majo” k.a. aperis sur diversaj frontoj de Ĉinio. Pri tiuj aferoj nia gazeto faris raportojn kaj eble vi iom informiĝis pri ili. Nun la “teatra trupo kun portvektoj” estas alia nova afero aperinta en la literaturaj kaj artaj rondoj de Ĉinio.

Ĉiu membro de la Donglu-a Huagu-opera Trupo, Maĉeng-gubernio, Hubej-provinco, havas vekton por porti dekoracion kaj rekvizitojn dum irado al ĉiuj komunumoj kaj brigadoj de la gubernio por fari prezentadon. Pro tio la amasoj honore titolis ĝin per “teatra trupo kun portvektoj”. Kaj simile la

Ensemblo de Janling-gubernio, Henan-provinco, la Ensemblo de Badong-gubernio, Siĉuan-provinco kaj la Pekinopera Trupo de Ankiu-gubernio, Ŝandong-provinco aktivadas en montvilaĝoj, akvolandoj, arbarregionoj kaj paŝtejoj por fari prezentadon al tieaj popoloj mem portante la rekvizitojn, muzikilojn ktp. per puŝĉaroj kaj dorskorboj. Komunumanoj titolis ilin per “teatra trupo kun puŝĉaro” aŭ “teatra trupo kun dorskorboj” kaj laŭdis ilin: “Kun revolucia spirito servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj la teatra trupo kun portvektoj venas al ni transirinte montojn por ludi teatraĵojn.”

La *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* faritaj de Prezidanto Maŭ Zedong antaŭ 33 jaroj montras: “Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj,



antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.” Hodiaŭ, pli kaj pli multaj literaturaj kaj artaj laborantoj suriris la ĝustan vojon montritan de Prezidanto Maŭ, kaj “teatra trupo kun portvektoroj” estas unu el iliaj kreaĵoj en sia tutkora servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

### GRANDA SCENEJO

En Ĉinio, fabrikoj, minejoj, vilaĝoj kaj kompanioj de ĈPLA estas rigardataj kiel “granda scenejo” por aktoroj.

En nia lando centoj da milionoj da kamparanoj, kiuj konsistigas la plejparton de la tuta loĝantaro, multe suferis en la malnova socio kaj estis tute senigitaj je la rajto de edukiĝo. Ili kreis brilegan kulturon, tamen estis apartigitaj disde literaturo kaj arto fare de la reakciaj regantaj klasoj dum la pasintaj miloj da jaroj. Konfucio, la reprezentanto de la sklavmastroj, absurde diris, ke sklavoj kaj kamparanoj kiel “malsuperuloj” scias nur terkulturon sed nenion alian inkluzive de kulturo kaj arto. Tio estas kalumnio al la laboranta popolo. La sklavaj ribeloj kaj

kamparanaj revolucioj faris senĉesajn atakojn kontraŭ tiu reakcia ideo. Sed nur post kiam la popola revolucio gajnis venkon sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la laboranta popolo liberiĝis en politiko kaj ekonomio kaj ĝi ekhavis la eblecon esti mastro en kulturo. Kun la disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo de la nova Ĉinio kaj senĉesa pliboniĝo de la materia vivo, la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj urĝe bezonas plibonigon de la kultura vivo kaj samtempe volas uzi la revoluciajn literaturon kaj arton kiel armilon por unuigi la popolon kaj bati la malamikon. Post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio iuj profesiaj teatraj trupoj iris ludi en kamparo, sed tio ankoraŭ ne povis kontentigi la bezonon de la vastaj komunumanaj amasoj. Pingvugubernio de Siĉuan-provinco situas en la vasta montregiono de Minŝan-montaro, kaj ĝiaj 170,000 hanoj, tibet-nacianoj kaj hujoj loĝas dise en 200 kilometrojn larĝa areo kun neĝmontoj kaj densaj arbaroj. Pro malfacila trafiko la lokanoj malofte havis ŝancon rigardi artan prezentadon.

Kiel oni devas trakti tian postulon de la vastaj kamparanaj amasoj? Varma disku-



*Prezentado surkampe*

tado pri tio iris inter la aktoroj de la Pekin-opera Trupo de Ankiu-gubernio, Ŝandong-provinco. Iuj el la trupo opiniis, ke oni ne devas iri al kamparo kaj montregiono por fari prezentadon, ĉar tie ne sufiĉas elektra energio kaj mankas teatrejo, kiuj estas necesaj por garantii la kvaliton de prezentado, kaj ke se oni nepre devas iri tien, oni iru laŭlonge de la fervojo, ŝoseoj aŭ alttensiaj linioj. Sed aliaj diris, ke la tuta Ankiu-gubernio havas 900,000 loĝantojn, el kiuj nur 10,000 loĝas en la gubernia urbo, dum 890,000 en ĝia kamparo. Ĉu servi al la malplimulto aŭ al la plejmulto, tio estas diverĝo inter la du linioj. La partia organizaĵo de tiu ĉi teatra trupo memorigis al ĉiuj pri tio, kiel la reviziisma literatura kaj arta linio de Liu Ŝaŭki antaŭ la kultura revolucio katenis la teatran trupon en urbo por kulturi la literaturajn kaj artajn laborantojn en spiritajn nobelojn apartiĝintajn de laboristoj kaj kamparanoj, tiel ke la tuta trupo iom post iom komprenis ke tio estas ĝuste la granda problemo elme-

tita de Prezidanto Maŭ en la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, nome al kiuj servu la literaturo kaj arto. Ili diris: “Ni ne devas servi nur al 10,000 sed al 900,000.”

Post la komenco de la kultura revolucio, same kiel la Pekin-opera Trupo de Ankiu-gubernio, ĉiuj teatraj trupoj, ĉu centraj aŭ lokaj, altigis en kritikado de la reviziisma literatura kaj arta linio sian politikan konscion servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj ekkonis ke ili devas ne nur fari prezentadon sur la malgrandaj scenejoj en urboj aŭ urbetoj sed ankaŭ iri al la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por fari prezentadon al ili.

### VOJO NEEBENA

Sed, same kiel kruta kaj zigzaga montvojo, neebena estas ankaŭ la vojo al kamparo kaj montregiono por tie fari prezentadon al kam-



*La Nacia Ensemblo de Liannan iras al kamparo por fari turneon.*



paranoj. Multaj teatraj trupoj sin konsiderantaj regulaj renkontis novan problemon en irado al kamparo.

Foje, la Vuhi-opera Trupo de Vugiang-gubernio venis al komunumoj kie oni jam longe ne povis rigardi teatraĵon. Tamen multaj estis la trupanoj kaj pezaj estis la dekoracioj, kaj oni devis sendi kelkajn komunumanojn por ilin helpi. Komunumanoj diris, ke “nur 14 el la pli ol 60 trupanoj sursceniĝis, tamen ni devis hasti ĝis kaptur-niĝo”.

Iu teatra trupo venis al montregiono de Pingvu-gubernio de Siĉuan-provinco por prezentado. Tiel multaj estis ĝiaj rekvizitoj kaj muzikiloj, ke la loko devis helpi ilin per nemalmultaj homoj en transportado, konstruo de provizora scenejo kaj aranĝo de manĝejo kaj ripozejo. La komunumanoj diris, ke tia teatraĵo estas tro multekosta por ili.

Aŭdinte la kritikojn de la komunumanoj la literaturaj kaj artaj laborantoj denove studis la instruon de Prezidanto Maŭ pri la rilato inter la problemoj ĉu servi aŭ ne kaj kiel servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Prezidanto Maŭ diris: **“Se tiuj ĉi du problemoj estas ne solvitaj, aŭ ne ĝuste solvitaj, niaj literaturaj kaj artaj laborantoj ne povos adaptiĝi al siaj cirkonstancoj kaj siaj taskoj.”** Se oni havas la volon kaj entuziasmon servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ili devas solvi ankaŭ la problemon kiel servi al ili. Fari prezentadon en la kamparo tiel, kiel oni faras en la urbo, tio evidente ne adaptiĝas al la cirkonstancoj de la kamparo. Post la studado literaturaj kaj artaj batalantoj diris, ke ili devas tutkore servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sed ne atendi servon de la lastaj. Rompinte la regulecon de teatra trupo, ili aplikis multajn rimedojn kiel simpligo de la ekipaĵoj por faciligi la transportadon kaj laŭbezona redukto de la personaro, tiel ke ilia servo kontentigis la komunumanojn. La Vuhi-opera Trupo de Vugiang-gubernio kun pli ol 60 personoj povas laŭbezone sin dividi en malgrandajn taĉmentojn por fari prezentadon

al kamparanoj, kaj du boatoj jam sufiĉas por transporti tutan taĉmenton kun ĝiaj objektoj. Multaj aktoroj de la Ensemblo de Pingvu-gubernio scipovas ludi plurajn muzikilojn, kaj ankaŭ la muzikistoj scipovas ludi teatraĵojn, tiel ke ankaŭ malgranda taĉmento povas bone fari prezentadon. Dum la lastaj jaroj, la Pekin-opera Trupo de Ankiu-gubernio mem transportis rekvizitojn, starigis scenejon kaj aranĝis vivon, por kiel eble plej malmulte ĝeni amasojn. Ili faris ankaŭ scenejajn lampojn lumigitajn per ambaŭ petrolo kaj elektro kaj dekoraciojn facile moveblajn kaj uzeblajn en pluraj scenoj. Pro la malpezeco de la objektoj, ili povas atingi kun puŝĉaroj lokojn kiujn ne povas atingi aŭto. La aktoroj kaj oficistoj de la Ensemblo de Hianghe-gubernio de Hebej-provinco sur ebenaĵo biciklis al kamparo kunportante siajn ekipaĵojn por fari prezentadon kaj ili ne bezonis atendi alporton de la bezonaĵoj. Kaj en montregionoj kiel la gubernioj Maĉeng kaj Badong, kien oni ne povas transporti la bezonaĵojn eĉ per puŝĉaroj aŭ bicikloj, oni devas tion fari per vektroj kaj dorskorboj, kaj pro tio aperis la “teatraj trupoj kun portvektroj aŭ dorskorboj”.

## GRANDA LERNEJO

Per sia revolucia agado la “teatraj trupoj kun portvektroj” ricevis varman laŭdon de komunumanoj. Kaj ankaŭ la literaturaj kaj artaj batalantoj trovis plej bonajn instruistojn kaj riĉajn instrumaterialojn tie. Ili diris, ke la kamparo estas ne nur granda scenejo sed ankaŭ granda lernejo.

Dum profundiĝo en la kamparon la “teatraj trupoj kun portvektroj” intimigis sian rilaton kun komunumanoj. Ĉie kien ili venis, ili lernis, laboris kaj kritikis reviziismon kune kun la amasoj. La literaturaj kaj artaj batalantoj petis maljunajn malriĉkamparanojn rakonti al ili historiojn de vilaĝoj, familioj kaj revoluciaj bataloj. Ili intervidiĝis kun miloj kaj miloj da herooj kaj labormodeloj en agrikulturo, forstumado, paŝtado, flankokupoj kaj fiŝado, kaj vidis propraokule



*Sceno el adaptita  
revolucia modela  
teatraĵo "Spirito de  
Longjiang"*

multajn heroaĵojn faritajn de ili. Ĉio ĉi tio donis al ili vivan edukon, forlavis iliajn malnovajn pensojn kaj malnovan artan vidpunkton kaj ankaŭ riĉigis ilian kreadon. "La prezentado por kamparanoj en kamparo kaj montregiono donis al mi novan vivon en politiko kaj arto," diris emociplene iu maljuna aktoro de la Pekinopera Trupo de Ankiu-gubernio. Troviĝas en tiu trupo ankaŭ juna aktorino, kiu opiniis facila la laboron de literaturo kaj arto je la komenco. Sed poste kiam la trupo survoje al kamparo devis transgrimpigi monton, vadi riveron kaj puŝi ĉaron, ŝi ekvolis forlasi la trupon. Foje, la trupo venis al iu komunumo por tie fari prezentadon. La modela ago de tiea instruistino de la komunuma elementa lernejo samaga al ŝi edukis ŝin. La instruistino komencis fari instruadon en la lernejo kiam ŝi estis 16-jara, kaj neniun fojon dum ses jaroj forestis je sia leciondona horo. Krom instruado, ŝi ankaŭ bredis porkojn por la kolektivo kaj organizis geknabojn por literatura kaj arta aktivado. Komparante sin kun ŝi la aktorino trovis sian eraron, kaj sub la eduko de la organizaĵoj de la Partio kaj la Komunisma Junulara Ligo de la trupo kaj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ŝi altigis sian politikan konscion kaj decidis "esti revoluciulo kaj ludi revoluciajn teatraĵojn por servi dum la tuta

vivo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj".

En la pasinteco, la objektoj bezonataj por prezentado de la Ensemblo de Janling-gubernio, Henan-provinco, estis aĉetitaj de la ŝtato. Depost kiam ili komencis prezentadi en kamparo, ili modeste lernis de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la revolucionan spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema entreprenado, kaj decidis ŝpareme konstrui la trupon. Nun ili mem faras laŭeble objektojn bezonatajn por prezentado kaj jam faris pli ol 400 muzikilojn, vestojn kaj rekvizitojn kaj per tio ŝparis por la ŝtato pli ol 10,000 juanojn. Ili opinias ke tio koncernas ne nur ekonomion, sed pli grave la radikan problemon ĉu oni vere translokis sian starpunkton en la flankon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La aktoroj kaj oficistoj de la "teatra trupo kun dorskorboj" de Pingvu-gubernio kore interligiĝis kun komunumanoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tre zorgas la vivon kaj ideologian reformadon de la literaturaj kaj artaj batalantoj, kaj la lastaj ĉiamaniere klopodas por servi al ili. Ili iris al kamparo kunportante akupunkturajn pinglojn, hartondilojn, librojn, bildgazetojn por la amasoj. Kaj koncerne al prezentado, ili elmetis al si la postu-



lojn fari prezentadon ĉie ajn, ne konsiderante tempon kaj nombron de rigardantoj. Foje, ili transgrimpis neĝan monton je 2,600 metroj altan por fari prezentadon al 80 tibetanaĵoj kaj hanaj komunumanoj de iu vilaĝo. Survoje ili renkontis du maljunajn abelbredistojn de la komunumo, kaj ili haltis kaj speciale ludis kvin programerojn por tiuj. Dum la lastaj tri jaroj, la Ensemblo de Pingvugubernio faris en kamparo prezentadon de pli ol 500 tagoj al centmiloj da homfojoj. Kaj la Ensemblo de la Ĵongŝuj-a Mjaŭ-a Aŭtonoma Gubernio en Damjaŭmontregiono de Guanghi jam faris post sia fondiĝo en la kultura revolucio pli ol 1,200 prezentadojn antaŭ pli ol 1,300,000 homfojoj el mjaŭoj, dungoj, jaŭoj kaj hanoj.

Por bone ludi rolojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sur scenejo, multaj aktoroj modeste lernis de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ĉiam diligente studis rolojn kaj pro tio rapide altiĝis ilia arto. Iuj junaj aktoroj de la Vuhi-opera Trupo de Vugiang-gubernio ĉiam ludis neĉefajn rolojn en la pasinteco en urbo kaj malofte havis ŝancon por sin hardi sur scenejo. Kaj kiam

ĝia malgranda taĉmento iris al kamparo por prezentado, tiam multaj roloj tamen malmultaj aktoroj kaj junaj aktoroj devis ludi ĉefajn rolojn kaj ilia arto rapide altiĝis en praktikado.

La prezentado en kamparo kaj montregiono de multaj profesiaj trupoj vigligis la amatorajn literaturajn kaj artajn aktivadojn de la amasoj. Helpate de “teatraj trupoj kun portvektaj”, multaj lokoj fondis sian amatoran ensemblon, kaj rapide kreskis granda nombro da amatoraj literaturaj kaj artaj aktivuloj. La Pekin-opera Trupo de Ankiugubernio kulturis entute pli ol 2,000 amatorajn literaturajn kaj artajn aktivulojn. Ĉie kie ili venis, ili helpis la amatorajn trupojn lerni kanti, gesti, ŝminki kaj fari simplajn dekoraciojn kaj rekvizitojn. Kaj iam ili eĉ faris prezentadon kune kun amatoroj.

Nun, nova literatura kaj arta armeo kreskas en profundiĝo en la vivon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Kaj la revolucia spirito de la “teatraj trupoj kun portvektaj” komencis disvolviĝi en la literaturaj kaj artaj rondoj de Ĉinio.



De vilaĝo al vilaĝo (ligno-gravuraĵo)

de Su Lang



*Sur draŝejo de Guanĝong, Ŝenhi-provinco, post riĉa rikolto de tritiko*

# Riĉa rikolto de someraj grenoj en Ĉinio

**S**UR la bazo de grandmezura pliprodukto de someraj grenoj en la lasta jaro, ĉijare nia lando refoje akiris riĉan rikolton de tio kaj la totala kaj pomua produktokvantoj ĉiuj atingis novan nivelon en la historio. La riĉa rikolto estas akirita dank' al tio ke la vasta amaso de kadroj kaj komunumanoj en la kamparo serioze studis la teorion pri la diktaturo de la proletaro, profunde disvolvis la movadon de "lerno de Daĝaj en agrikulturo" kaj pene venkis sekegecon kaj aliajn naturajn katastrofojn.

El 24 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando, kiuj produktas some-

*Lernantoj spikumus por la kolektivo.*





rajn grenojn, ĉijare 19 akiris pliprodukton. Niaj nordaj provincoj kaj municipoj, kies kulturata areo de someraj grenplantoj konsistigis 70% de tiu de la tuta lando, ĉiuj akiris pliprodukton. La produktokvanto de la provincoj Ŝandong, Anhuj, Hubej, Ŝenhi, Gansu, Guangdong, Junnan, Liaŭning kaj Ŝanhi kaj la urboj Pekino kaj Tiangin plimultiĝis je 10-20%. Kaj tiu de la provincoj Henan, Hebej kaj Ŝenhi kaj la urbo Pekino en ĉi tiu somero superis ilian totalan jaran produktokvanton en 1949 respektive. Pluapase altiĝis la pomua produktokvanto de someraj grenoj de la tuta lando. Nombro da regionoj, urboj kaj gubernioj kun pomua produktokvanto de pli ol 200 kg. plimultiĝis ol tiu en la lasta

jaro; la komunumoj kun pomua produktokvanto de pli ol 350 kg. kaj la produktaj brigadoj kun tiu de pli ol 400 kg. aperis grandnombre. Ankaŭ multaj regionoj kun malalta produktokvanto rapide ŝanĝis sian fizionomion. Liaŭĉeng de Ŝandong-provinco, Ŝangkiu de Henan-provinco, Hengŝuj kaj Cangĝou de Hebej-provinco, kiuj suferis seriozan sekecon, inundon kaj salalkalozon, kaj Julin kaj Jan-an de Ŝenhi-provinco, kiuj suferis seriozan sabloventon kaj sekecon, ĉijare akiris grandmezuran pliprodukton de someraj grenoj en granda areo.

Tritiko, kiel ĉefa speco de someraj grenoj de Ĉinio, plejparte produktiĝas en la norda parto de Jangzi-rivero. Kaj ceteraj specoj

*Rikoltado de tritiko de la produkta brigado Daĝingeĝuang de Ĝuĉeng-gubernio, Ŝandong-provinco*



pizo, fabo, hordeo, printempa batato kaj aliaj estas produktataj ĉefe en la suda parto de nia lando. La areo de someraj grenoj konsistigis 25% de la totala areo de grenoj de la tuta lando kaj ilia produktokvanto konsistigis ĉirkaŭ 20% de la tutlanda produktokvanto de grenoj. Tial riĉa rikolto de la someraj grenoj havas gravan signifon por plimultiĝi grenan produkton de la tuta jaro.

En la kuranta jaro, dank' al studado de teorio pri la diktaturo de la proletaro kaj profunda kritikado al reviziismo kaj kapitalismo lige kun la batala praktiko de la kamparo, la vasta amaso de kamparaj kadroj kaj komunumanoj pluapasaĵe altigis sian aktivecon pri konstruado de socialismo. Ili entreprenis agrikulturan fundamentan konstruadon, plimultiĝis kulturatan areon de tritiko kaj devastigis spertojn pri riĉa rikolto de tritiko, tiel ke plialtiĝis la pomua produktokvanto de tritiko. De la lasta vintro, pli ol 1,000,000 diversnivelaĵoj kadroj de provincoj, subprovin-


coj, gubernioj kaj komunumanoj iris al bazaj unuoj de agrikultura produkto kaj tie kune kun komunumanoj klopodis por akiri riĉan rikolton de tritiko. Ĉijare la norda parto de nia lando refoje suferis sekegecon kaj tieaj komunumanoj unuflanke entreprenis grand-skalan akvoutiligan konstruadon kaj aliflanke batalis pli ol 200 tagojn kontraŭ la sekegeco per la konstruitaj maŝinputoj, akvorezervejoj, elektraĵirigaciaj stacioj kaj eĉ per vektopor-tado de akvo, dank' al kio bone kreskis la tritiko. En iuj lokoj de nia sudo, la kontinua malgranda pluvo kaj malalta temperaturo malhelpis la kreskadon de tritiko en lasta periodo, tamen tieaj komunumanoj akiris riĉan rikolton per sia diligenta laboro en akvodrenado, sterkado kaj flegado de grenplantoj.

Nun la vasta amaso de kamparaj kadroj kaj komunumanoj de nia lando entuziasme faras flegadon al aŭtunaj grenplantoj por akiri tutjaran riĉan rikolton de greno.

*Komunumanoj de Luanĉeng-gubernio, Hebej-provinco, ensakigas la sekigitan tritikon por ĝin sendi en grenejon.*







# Elektrizado de la Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo

GJU HINHUA

**J**E la 1-a de julio de la kuranta jaro la elektrizado de la fervojo de Baŭgi ĝis Ĉengdu, konstruita en la Unua Kvinjara Plano de la Nacia Ekonomio (1953 — 1957), estis kompletigita kaj la tuta linio estis lanĉita al trafikado. Ĝi estas la unua elektrizita fervojo de nia lando kaj nun kun duobligita transporta kapablo servas kiel moderna kaj grandefika arterio kondukanta al la Sudokcidento de nia lando kaj multe kontribuas al la disvolvo de nia nacia ekonomio kaj markis novan paŝon al modernigo de nia fervoja trafiko.

## PERSISTE APOGI NIN SUR NIAJ PROPRAJ FORTOJ

La fervojo komenciĝanta norde de la urbo Baŭgi de Ŝenhi-provinco kaj finiĝanta sude en Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉuan-provinco longas je 676 kilometroj. Ĝi trapasas multajn krutajn montojn. En la malnova socio de miloj da jaroj tiuj montoj estis rigardataj kiel malfacile transflugeblaj por birdoj kaj nesurgrimpeblaj por simioj. Li Baj, poeto de Tang-dinastio (618 — 907), havis jenajn versojn: “Penigas ja la vojo al Siĉuan, kiel voj’ al la ĉielo.” Nelonge post la fondiĝo de la nova Ĉinio, gvidate de la Ĉina Komunista Partio, la ĉina laboristaro venkis senombrajn malfacilojn kaj konstruis la fervojon de Baŭgi ĝis Ĉengdu, kiu ludis grandan rolon en plibonigo de trafiko en la Sudokcidento kaj subteno de la socialisma konstru-

ado. Sed, la trafiko ankoraŭ estis multe limigita kaj ne povis plenumi la bezonon de la socialisma konstruado pro tio, ke multaj partoj de la fervojo havas grandan kliniĝon kaj longajn deklivojn, abundas je tuneloj kaj kurbiĝoj, tiel ke vapora lokomotivo nur povis malrapide treni nemultajn vagonojn.

Por altigi la transportan kapablon de la fervojo, la ŝtato decidis elektrizi ĝin kaj anstataŭigi la vaporajn lokomotivojn per elektraĵoj.

La elektrizado de la fervojo de Baŭgi ĝis Ĉengdu komenciĝis en 1958. Sed pro la ĝenado kaj subfosado de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, la aktiveco de la fervojistoj estis katenita. Tial, ĝis 1961, oni elektrizis nur la parton de Baŭgi ĝis Fengĝoŭ, kiu estis ĉ. sepono de la fervojo. Poste la tuta konstruado estis ĉesigita.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la ŝtato decidis denove komenci la elektrizadon de la fervojo.

La supera instanco postulis, ke oni elektrizu 100 kilometrojn da fervojo en la unua jaro. Pro hasta komenco la konstruado havis ne sufiĉajn necesajn blupaperojn kaj materialojn kaj aliajn malfacilojn. La partia organizo kaj la revolucia komitato de la konstrua komandejo ne estis ĝenataj de la malfavoraj kondiĉoj, sed persistis en la principo “direkti per proleta politiko” kaj unue

disvolvis amasan kritikadon kontraŭ la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. En kritikado multaj laboristoj diris: “Antaŭe, praktikante la reviziisman linion Liu Ŝaŭki alte honoris fremdlandajn specialistojn, sed neglektis la aktivecon kaj kreivecon de ni laboristoj, ĉu tio povus direkti la konstruadon en bona ordo? Nun la revolucia linio de Prezidanto Maŭ baziĝas sur plena fido al kaj apogo sur la laboristaro, kaj ni nepre devas imiti la ekzemplon de la laboristoj de Daking, plenumi la principon de Prezidanto Maŭ **‘sendependeco, memdecido kaj apogo sur propraj fortoj’** kaj rapidigi la konstruadon de nia elektra fervojo.”

Post tio la komandejo de konstruado mobilizis la laboristojn al elpensado de diversaj rimedoj kontraŭ la malfaciloj. Por havigi al si mankantajn blupaperojn, teknikistoj de konstruado helpis la projektan fakon. Por frue akiri konstruajn materialojn, laboristoj iris en fabrikojn por helpi. Por havigi al si specialajn ekipaĵojn neaĉetebajn, laboristoj mem tion faris. Tiam translokigo de iu parto de la fervojo ne estis finita, kio influis la ĉefan laboron de la elektrizado. Ili do petis ke la fako de fervoja translokigo fiksi kaj sciigu al ili la altecojn, centrajn liniojn kaj kruciĝajn punktojn, por ke samtempe kun la fervoja translokigo oni povu starigi ferturojn kaj instalii aerajn kontaktajn dratojn. Sekve de tio la laboristoj sukcese plenumis sian taskon.

Dum la konstruado malfaciloj aperadis unuj post aliaj, sed la konstruantoj venkis ilin per la revolucia spirito “kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi”. Ili memprojektitis kaj faris multajn ekipaĵojn kaj materialojn, aplikis novajn teknikojn kaj faris pli ol 400 teknikajn renovigojn, dank’ al kio la konstruado de elektrizado de la linio estis venke plenumita.

Oni konstatis ke la meznombra rapideco de la elektrizado en ĉiu jaro estis trioblo de tiu de la parto elektrizita antaŭ la kultura revolucio, dum la elspezo reduktiĝis je duono. Cetere ĉiuj elektrizitaj partoj de la fervojo sukcese trapasis provon per unu fojo.

## DISVOLVI LA SPIRITON DE KUNLABORO

La elektrizado de la fervojo de Baŭgi ĝis Ĉengdu estis farita tute sen interrompo de la normala trafikado de la fervojo. Tio postulis, ke la projektaj, konstruaj, transportaj, telekomunikaj kaj elektroprovizaj unuoj bone kunlaboru sub la unueca gvido de la Partio, por konstrui la unuan elektran fervojon de nia lando “multe, rapide, bone kaj ekonomie”.

La elektrizado de la stacio Ĉengdu estis la lasta kaj ankaŭ la plej komplika parto de la elektrizado de la tuta linio. La Ĉengdu-a Stacio estas la interliga punkto de la fervojoj Baŭgi-Ĉengdu-a, Ĉengdu-Congking-a kaj Ĉengdu-Kunming-a. La stacion trapasas multaj trajnoj ĉiutage. La tasko por ĝia elektrizado estis tre peza, sed en harmonia kunlaboro la 11 konstruaj unuoj kaj la transporta fako de la stacio plenumis la konstruan taskon garantiante glatan trafikadon.


En majo ĉijare la elektriza konstruado de la stacio estis en plej intensa stadio. Ĉiuj ĝiaj komutiloj devis esti manipolataj per homa forto. En tiuj tagoj senĉese pluvadis. La komutistoj devis piediri en pluvo por manipuli komutilojn unu post alia kaj post kontrolo de la fervoja linio piedire gvidis trajnojn en la stacion. Antaŭe la staciaj deĵorantoj direktis trajnojn per signaloj, sed en tiuj tagoj ili devis fari tion per laŭtparolilo kaj telefono. Raŭkiĝis al ili la voĉo pro laŭta parolado, sed preninte kelkajn tablojdojn ili persiste daŭrigis sian laboron. Por garantii la glatan iradon de la elektrizado de la stacio, laboristoj preferis mem labori pene.

La konstruantoj ofte konsideris malfacilojn de la transportaj unuoj en sia laboro. Foje oni devis starigi 15-metran ferturon en la pakajejon. Laŭ kutima metodo oni devis malkonstrui parton de la pakajejo kaj poste starigi ferturon. Tio multe malhelpus la laboron de la pakajejo kaj kaŭzus maloportunon al pasaĝeroj. Post cerbumado la konstruantoj elpensis solvon. Ili faris en la tegmento de la pakajejo truon kun grandeco de 1.5 kvadrataj metroj kaj poste eltiris la



ferturon tra la truo. Laboristoj de la pakaĵejo unuvoĉe laŭdis la helpemon de la konstruantoj.

La elektrizado de la fervojo ricevis varman helpon de laboristoj de poŝtaj, telekomunikaj, brodkastaj kaj elektroprovizaj unuoj de la provincoj Ŝenhi, Gansu kaj Siĉuan kaj de vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj mal-superaĵ mezkampanoj loĝantaj ambaŭflanke de la fervojo. Inter Fengĝoŭ kaj Ljuejang oni devis instali elektran linion de 110,000 voltoj. La linio devis trapasi multajn krutajn montojn maldensege loĝatajn kie




*Laboristoj instalas alttensian kontak-tan reton.*

la transportado estis tre malfacila. La laboristoj de la Ŝenhi-provinca Kompanio de Elektroproviza kaj Transformila Inĝenierado batalis 5 monatojn en la montaro kaj fine starigis la alttensian elektran linion kun longeco de pli ol 130 kilometroj, pere de kiu la fervojo akiras potencon kurenton.

### LA AMASOJ ESTAS VERAJ HEROOJ

La elektrizado de la fervojo de Baŭgi ĝis Ĉengdu akcelis nian industrion de fervoja elektrizado. Laboristoj de nia lando produktis pli ol 4,000 specojn de elektrizaj ekipaĵoj kaj materialoj por la fervojo. Samtempe kun tio rapide kreskis juna trupo de konstruantoj.

La elektra lokomotivo de tipo "Ŝaŭŝan" uzata sur la fervojo estas fabrikita de la Tianhin-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko de Ĝuĝoŭ, Hunan-provinco. Antaŭe ĝi nur povis ripari vaporajn lokomotivojn. Antaŭ la kultura revolucio la fabriko jam komencis prove fabrikati elektran lokomotivon. Sed pro la ĝenado de la kompradora filozofio kaj rampismo distrumpetitaj de Liu Ŝaŭki, la prova fabrikado restis en imitado de fremdlandaj produktaĵoj sen progreso.



*Elektra lokomotivo Ŝaŭŝan sur la vojo*



*Laboristina grupo en la fervoja elektrizado*

En la kultura revolucio, la partia komitato de la fabriko sendis laboristojn kaj teknikistojn al la elektrizita sektoro de la fervojo por ke ili veturu en elektraĵaj lokomotivoj kaj faru enketadon kaj analizadon. Tiuj esprimis, ke ili nepre elhakos por si novan vojon de disvolvigo de industrio kaj produktos multajn kaj bonajn lokomotivojn.

La hidrargovapora rektifikilo de la elektra lokomotivo estas unu el la tri gravaj maŝinpecoj influantaj la kvaliton de lokomotivo. Laboristoj kaj kadroj de la Tianhin-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko kaj teknikistoj de la Instituto de Elektra Lokomotivo de Ĝuĝou provis fari tion en pluraj monatoj kaj malsukcesis. Sed sub la helpo de fratanoj ili fine sukcesis fari duonkonduktan rektifilon por anstataŭi ĝin. Poste ankaŭ la aliaj du ŝlosilaj maŝinpecoj estis sukcese fabrikitaj.

En la sukcesoj la partia komitato de la fabriko pli bone konis la veron, ke **“la popolo, nur la popolo estas la movforto kreanta la**

**mondan historion”**, altigis sian konscion pri tutkora sinapogo sur la laboristaro; dum la laboristoj pli klare vidis sian forton, firmigis la decidon iri la vojon de sinapogo sur propraj fortoj kaj disvolvis en la fabriko amasan teknikan renovigon. La fabriko reformis multajn grandajn kaj malgrandajn maŝinpecojn de la lokomotivo. Sur la bazo de la amasa renovigo la projektantoj koncentris la sukcesajn renovigojn kaj projektis la elektran lokomotivon “Ŝaŝan” kun karakterizoj de nia lando. Poste la fabriko projektis kaj faris 140 specialajn ekipaĵojn kaj baldaŭ komencis pogranda produkton de la elektraĵaj lokomotivoj.

Nun sur la fervojo de Baŭgi ĝis Ĉengdu galopas elektraĵaj lokomotivoj “Ŝaŝan”.

El la konstruantoj de la elektrizado de la fervojo multaj estas novaj laboristoj. Ili maturiĝas rapide kaj estas multe laŭdataj, precipe iu virina grupo de kontakta sistemo.

Tiu grupo konsistas el junulinoj, kiuj partoprenis en la laboro post 1970. Ilia mez-nombra aĝo estas 24-jara kaj la plej juna el ili estas 19-jara. La laboro de kontakta sistemo inkluzivas jenajn laborojn: starigi ferturojn kaj instali kaj reguligi aerajn elektraĵajn dratojn. En la lasta stadio de la elektrizado de la fervojo la grupo estis asignita al regulado de la aera kontakta sistemo de la orienta stacio de Ĉengdu. La laboro estis tre peniga. La junulinoj eklaboris frue kaj ripozis malfrue, ĉu en pluvo aŭ vento, ĉu sub la arda suno, ili ĉiam persistis en entuziasma laborado. La 44-a ferturo kliniĝis pro la malkompakta grundo de ĝia bazo. Sub direkto de veterana laboristo ili firmigis la bazon kaj vertikalis la turon. Kelkfoje ili devis labori en aero 20 metrojn super la tero. Unu ŝtuparo ne sufiĉis por atingi la altecon, la junulinoj do kunligis du ŝtuparojn. Ili kuraĝe kaj lerte ascendis kaj laboris en aero. Post klopodado de du monatoj ili bone plenumis la reguladon de la kontakta sistemo.


Nun la konstruantoj, kiuj elektrizis la fervojon de Baŭgi ĝis Ĉengdu, transiris al alia loko por plenumi novan taskon.



---

Filmo

---



Plena de profunda klasa amo, Jingsaŭ kuras al  
la sveninta vundito por savi lin per sia lakto.


# La revolucia moderna baletto “Himno al Jimeng”



La vundita plotonestro Fang estas soifa kaj minacata de morto, sed Jingsaŭ povas trovi neniom da akvo sur la monto. Subite venis en la kapon de Jingsaŭ la ideo ke lakto povas estingi soifon.

La kokina supo signifas profundan klasan amon.

En profunda nokto ŝi stufas kokinon por la vundito.







La montregiono Jimeng en la provinco Sandong estas unu el la malnovaj bazoj de la ĉina revolucio. En la Liberiga Milito ticaj trupoj kaj popolo unuiĝis kiel unu homo kaj faris malcedeman batalon kontraŭ kuomintangaj reakciuloj. En la baseno de la rivero Ji kaj la montaro Meng cirkulas multaj kurtuŝaj historioj pri la profunda klasa amo inter la popolo kaj la popola armeo.

Lastatempe en Ĉinio estas prezentata la revolucia moderna baletto *Himno al Jimeng*, kun la supre dirita historia periodo kiel sia fono. La baletto priskribanta malriĉan kamparaninon, kiu savis per sia lakto vunditan plotonestron de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj poste ŝirmis kaj flegadis lin, estas himno al la unuiĝo de la armeo kaj la popolo.

La historio de la baletto okazis en aŭtuno de 1947, nome en la dua jaro de la Liberiga Milito de la ĉina popolo. Observante la principon donitan de Prezidanto Maŭ Zedong transiĝi de strategia defensivo al strategia ofensivo, la Ĉina Popola Liberiga Armeo evakuis kaj komencis grandskalan movadan militon. En agonio kuomintangaj reakciuloj faris frenozan reatakon kontraŭ la bazloko de Jimeng. En batalo kontraŭ la atako de malamikoj Fang Tiegjun, plotonestro de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, vundiĝis kaj svenis sur monto. La forfuĝinta bienulo-tirano Laj Ginfu kaj lia Hejmenrevena Taĉmento (armita trupo de bienularo) revenis en la montvilaĝon kaj komencis ĝin traserĉi por kapti Fang Tiegjun. La baletto evoluas kun la traserĉo de

la malamikoj kaj la kontraŭbatalo de Jingsaŭ kaj la vilaĝanoj.

La heroino en la baletto Jingsaŭ estas ordinara kamparanino. Iun tagon ŝi venas al la monto por kolekti manĝeblajn herbojn kaj rimarkas la svenintan Fang Tiegjun. Per metodaj dancmovoj, pozoj, diversaj artaj rimedoj de muziko kaj dekoracio, la baletto akcente esprimas ŝian profundan klasan amon al la popola armeano. La rimarko de sangmakulo, la trovo de la vundito post spurado, la pansado kaj la brula maltrankviliĝo de Jingsaŭ pro la soifanta vundito, ĉio tio estas esprimita per serio da klare distingaj dancmovoj, kaj montras zorgon de Jingsaŭ pri la sekureco de la vundito, kaj ŝian singardemon kontraŭ probable alveno de banditoj de la Hejmenrevena Taĉmento. Trovinte la akvobotelon de Fang Tiegjun malplena, Jingsaŭ, ĝin tenante, en la sino, cerbumadas kiel kvietigi al Fang Tiegjun la soifegon. Subite venas al ŝi en la kapon la ideo: "Mia lakto taŭgas!" En tiu momento oni vidas belegan scenon: Sunradioj penetras tra la foliaro de arboj, lumkolonoj brilas kaj la montoj pli heliĝas. El post la kuliso elflugas patosa kanto en impona muziko: "Ho, la karul' saviĝis per la lakto, la amo inter la armeo kaj l' popolo grandas kiel monto . . ." La emocia arta rimedo bone reliefigas Jingsaŭ, kiu tenas la akvobotelon kun lakto kaj proksimigas ĝin al la buŝo de la vundito. La pensiga intrigo tre bone spegulas la profundan klasan amon inter la popola ar-



meo kaj la popolo de la montregiono Jimeng. Tio povas rememorigi pri la longa periodo de la ĉina revolucio, en kiu por sia liberiĝo, milionoj kaj milionoj da popolanoj konscie pre-



Jingsaŭ brave luktas kontraŭ la malamikoj.

La ĈPLA-a trupo venke revenas al Jimeng - montaro, kaj Jingsaŭ kaj la vilaĝanoj adiaŭas la resanigitan plotonestron Fang.



Sagaca kaj aplomba plotonestro Fang sin ŝirmas kontraŭ la tra-serĉado de malamikoj.



Plotonestro Fang sentime protektas la vilaĝanojn.

nis sur sin la pezan ŝarĝon de la revolucio, helpis senŝanceliĝe siajn trupojn en la milito. La kortuŝa temo “lakto de la popolo — sango de la armeo” ja estas elĉerpita el kaj rafinita en la torento de la popola milito.

Post revivigo de Fang Tiegjun Jingsaŭ fervore lin flegadas. Vespere endormiginte sian bebon Jingsaŭ buĉas sian kokinon solan kaj stufas ĝin por Fang Tiegjun. En kvietaj noktoj, antaŭ la forno Jingsaŭ ordigas la lavitajn ban-





daĝojn kaj zorgas la kuiradon. Tiam ŝiaj senĝenaj kaj graciaj dancmovoj akompanataj de lirika kaj patosa melodio de popolkanto de suda Ŝandong montras ŝian revolucionan konscion kaj noblan spiriton, ŝian nesondeble profundan amon al la popola armeo kaj la sinceran deziron de la tuta popolo de la montregio-

no Jimeng al la karulo el ĈPLA, ke li baldaŭ resaniĝu kaj reiru al batalo por la liberigo de la popolo.

Sub la blanka teroro de Kuomintango ŝirmado al vundita ĈPLA-ano estis akra danĝerplena batalo. Nokte banditoj de la Hejmen-



Sub la ruĝa suno,  
la soldatoj kaj  
popolanoj kune  
celebras la ven-  
kon.



revena Taĉmento entrudiĝas en la domon de Jingsaŭ kaj rimarkas la stufitan kokonon sur la forno. Ili vipe torturas Jingsaŭ. Sub la turmentado de la malamiko Jingsaŭ restas mirinde aplomba kaj nefleksebla. La firmaj kaj fortaj dancmovoj kaj pozoj manifestas ŝian

mortan malamon kontraŭ la malamikoj kaj ŝian nesubigeblan batalvolon. Poste malamikoj klopodas ruze trompi Jingsaŭ kaj kaŝe postsekvi ŝin. Sed Jingsaŭ, helpate de la najbaro Onklino Ĝang, sagace forkondukas ilin kaj sukcese portas la kokojn kaj manĝaĵon al Fang Tiegjun.

Ne povante informiĝi ĉe Jingsaŭ pri Fang Tiegjun la Hejmenrevena Taĉmento komencis freneze traserĉi la montojn. La banditoj trovas la kavernon, en kiu sin kaŝas Fang Tiegjun, kaj bruligas ĝian ĉirkaŭaĵon. Tiam Jingsaŭ intence aperas en la vido de la malamikoj por altiri al si ilian atenton, montrante en tio heroan sinoferemon.

La baletto *Himno al Jimeng* akcente pri-skribas la amon de la popolo al la armeo per la figuro de heroo Jingsaŭ, elstara reprezentanto de la popolamasoj. Samtempe ĝi modlas ankaŭ la figuron de Fang Tiegjun per konciza danca lingvo spegulante la amon de la armeo al la popolo. En la tria sceno de la baletto oni vidas, ke en sinekzercado antaŭ la kaverno-ŝirmejo Fang Tiegjun pene kolektas manĝeblajn herbojn por helpi Jingsaŭ, malgraŭ ke li ankoraŭ ne tute resaniĝis. Kiam la banditoj neniel povas trovi Fang Tiegjun kaj en kolero intencas masakri la vilaĝanojn kaj ĵeti la bebon de Jingsaŭ en valon, Jingsaŭ preferas oferi sian infanon por ŝirmi Fang Tiegjun. En la momento, kiam la vivo de la vilaĝanoj estas sur hareto, Fang Tiegjun, kiu rigardas la intereson de la popolo plej alta, subite aperas antaŭ la malamikoj kiel giganta monto kaj deprenas de la malamiko la bebon. En la sama sceno la nobla spirito de la du herooj kune formas brilan imponan bildon pri la profunda amo inter la armeo kaj la popolo.

La figuro de Jingsaŭ en la baletto *Himno al Jimeng* estas eminenta reprezentanto de la **“milionoj kaj milionoj da amasoj, kiuj kore kaj sincere subtenas la revolucion”**. Pere de tiu figuro la baletto elokvente montras la marksisman veron, ke **“la plej riĉa fonto de povo por fari militon kuŝas en la popolamasoj”**. En la fino, sub la helpo de la Liberiga Armeo kaj la popola armita forto gvidata de

la edzo de Jingsaŭ la amasoj de la vilaĝo Jihe ekstermis la Hejmenrevenan Taĉmenton.

La dancoj de la *Himno al Jimeng* havas intensan etoson de reala vivo kaj originalecon. Por verki kaj prezenti la baletton la geaktoroj kaj koreografoj de la Ĉina Baleta Trupo plurfoje iris al la montregiono Jimeng kaj kreis dancajn lingvojn sur la bazo de la riĉa vivo de la tieaj amasoj, ensorbinte multajn utilajn metodojn de antikvaj, eŭropaj kaj popolaj dancoj. En la baletto la lulado de la bebo, la kaptado de kokino, la kolektado de manĝeblaj herboj kaj aliaj dancmovoj estas esprimataj tre simile al tiuj en la reala vivo, impresas per intimeco kaj forte infektas. La solo-danco de Jingsaŭ en kuirado de kokino ensorbis movojn de *jango* (speco de ĉina popola danco) kaj la metodon de turniĝado sur piedpinto de baletto. Kiam Jingsaŭ forviŝas per piedpinto la sangmakulojn sur la tero, movoj de cirklado per piedo de klasika baletarto estas aplikataj, tiel ke klasika danco-paŝo estis reformita en esprimo de nova enhavo.

La muziko de la baletto *Himno al Jimeng*, precipe la tonala muziko de la herooj en la baletto karakteriziĝas per intensa etoso de la epoko kaj klara nacia koloro. La koreografoj prenis la popolkanton de Ŝandong *Ario de Jimeng* kiel la bazon de la tonala muziko por Jingsaŭ. Por modli figuron de Jingsaŭ, la koreografoj konservis la simplan kaj elegantan melodion de la originalo, kaj samtempe faris al ĝi prilaboradon, por ke ĝi fariĝu pli helsona kaj pli signifa. La tonala muziko de Fang Tiegjun estas kreita sur la bazo de melodio de revolucia kanto. Tia kreado de baletto kaj la ludado per ĉinaj naciaj muzikiloj kiel la ĉefaj muzikiloj donas al la baletto fortan infektivon kaj pretigis valoran sperton por disvolvi la proletan koregrafion de Ĉinio.



# Kampara aĉeta kaj disvenda kooperativo


**L**ASTATEMPE ni vizitis aĉetan kaj disvendan kooperativon Ĉaki en Huaĵong-gubernio de Hunan-provinco. Tie ni propraokule vidis prosperecon de kampara merkato, stabilecon de varprezoj kaj vigecon de aĉetado kaj disvendado. Ni ekkonis ke la kamparaj aĉetaj kaj disvendaj kooperativoj en nia lando ludas gravan rolon en akcelo de la agrikultura produktado, firmigo de la kolektiva ekonomio de popola komunumo, prosperigo de la merkato kaj garantiado al provizado al la loĝantoj de la urboj kaj kamparo.

## PROSPERA KAMPARA KOMERCO

La aĉetaj kaj disvendaj kooperativoj en la popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj en la ĉina kamparo funkcias por provizi la kamparon per bezonaĵoj de produktado kaj vivado kaj samtempe aĉeti agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn por la ŝtato. La aĉeta kaj disvenda kooperativo Ĉaki estas unu el ili. Ĝi fondiĝis en 1951. En la komenco ĝi estis butikoj starigita de kamparanoj mem. Tiam nia lando troviĝis ankoraŭ en la periodo de restarigo de la nacia ekonomio kaj en la kamparo ankoraŭ ne ĝenerale fon-



*Transporti agrikulturilojn kaj kemian sterkon rekte al produkta taĉmento*



*Ripari agrikulturilojn por produkta taĉmento*

diĝis ŝtataj magazenoj, urbaj kontraŭleĝaj kapitalistoj kaj kamparaj spekulaciaj komercistoj daŭre ekspluatatis kamparanojn ĉasante profitegon per aĉeto de agrikulturaj kaj flank-okupaj produktaĵoj je malalta prezo kaj vendado de ĉiutagaj industriaĵoj je alta prezo. Por limigi ilian ekspluatadon la popola registaro mobilizis kamparanojn al organizado de aĉetaj kaj disvendaj kooperativoj per si mem. Kaj la aĉeta kaj disvenda kooperativo Ĉaki fondiĝis en tiaj cirkonstancoj.

En la pasintaj pli ol dudek jaroj, kun disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, granda ŝanĝo okazis al la kampara komerco kaj ĝiaj organizoj fariĝis pli perfektaj kaj la merkato pli prospera. Ĉen Hjueŝeng, sekretario de la partia filio kaj direktoro de la aĉeta kaj disvenda kooperativo Ĉaki, diris al ni, ke la kooperativo nun servas al 170 produktaĵaj taĉmentoj de 17 produktaĵaj brigadoj kun 28,000 loĝantoj, per livero de bezonaĵoj por produktado kaj vivado kaj aĉetado de agrikulturaj kaj flank-okupaj produktaĵoj. Ĝiaj oficistoj pliiĝis de 4 ĝis 89, kaj ĝia cirkula kapitalo kreskis de 1,100 ĝis 587,000 juanoj, kaj el tiu sumo 98.9% estas ŝtata mono kaj nur 1.1% estas kolektiva kapitalo de la komunumanoj. Antaŭe ĝi havis nur unu vendejon, sed nun jam havas vendejojn en tri lokoj dense loĝataj,

kaj ĉiu el ili havas kelkajn sekciojn — sekciojn de ŝtofoj, flankaj manĝaĵoj, hotela kaj restoracia servo, ĉiutagaj vivbezonaĵoj, materialoj por produktado kaj aĉetado. Krome estas stacio kiu plenumas aĉetadon de porkoj, fiŝoj, ovoj kaj dombirdoj kaj transportado de ili al aliaj lokoj, kaj funkcias ankaŭ farejo de kukoj kaj bombonoj por provizi la tutan komunumon. Post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio estis starigitaj ĝiaj agentaj vendejoj kaj aĉetejoj en ok produktaĵaj brigadoj. Samtempe la aĉeta kaj disvenda kooperativo ankoraŭ metis sub sian gvidon kelkajn kooperajn butikojn formitajn el privataj butikoj en la tempo de transformado de la privataj kapitalismaj industrio kaj komerco en la komenca periodo post la Liberiĝo. Tiuj butikoj ankoraŭ restas kolektiva posedaĵo. Nun jam ne plu ekzistas privataj butikoj.

Dum nia vizitado al Ĉangŝa, la ĉefurbo de Hunan-provinco, al Huaĵong-gubernio kaj la aĉeta kaj disvenda kooperativo Ĉaki ni vidis, ke ĉie regas prospereco en komerco. Ĉiuj vendejoj estas plenaj de diversaj varoj kaj tuttage frekventataj de aĉetantoj. Ni prenu la aĉetan kaj disvendan kooperativon Ĉaki kiel ekzemplon. Troviĝas en ĝi preskaŭ ĉiaj varoj bezonataj de la amasoj en ĉiutaga vivo kiel ŝtofoj, ĉiutagaj vivbezonaĵoj, elektraj instrumentoj kaj metalaĵoj, kulturaj kaj fizikkulturaj instrumentoj, bombonoj, kukoj, cigaredoj, alkoholaĵoj, teo, flankaj manĝaĵoj kaj materialoj por produktado. Tie la komunumanoj povas vidi produktaĵojn el Kantono, Vuhan, Ŝanhajo kaj Pekino. Antaŭe la kooperativo Ĉaki ne vendis biciklojn, brakhorloĝojn, radioricevilojn, dekronojn, lanajn kaj poliamidajn ŝtofojn, kaj tiel plu, sed nun tiuj varoj estas rapide vendataj en ĝi.

Antaŭ pli ol dek jaroj ĝia sekcio por produktaĵaj materialoj vendis nur pli ol 30 specojn de varoj, sed en la lastaj jaroj jam 400 specojn, de malgrandaj agrikulturiloj kiel ŝpato kaj portvekteto ĝis agrikulturaj maŝinoj kiel dispeciga maŝino, draŝmaŝino, kotonsen-



semigilo kaj oleprema maŝino. Cetere ĝi ankaŭ vendas diversajn insekticidojn, kemiajn sterkojn kaj herbicidojn. Tio montris la disvolviĝon de la agrikultura produkto en la loko.

En ĝia aĉetejo ni vidis ke multaj komunumanoj vendas porkojn, ovojn, dombirdojn kaj aliajn agrikulturajn kaj flankokupajn produktajn, kaj ke granda kvanto da aĉetitaj materialoj estas enaŭtigata por transporti al aliaj lokoj.

De multaj jaroj la varprezoj restas malaltaj kaj la merkato stabila, ĉar la kampara merkato estis plejparte tenata en la mano de la ŝtata komerco. Per 10 juanoj oni povas aĉeti 6.3 kilogramojn da porkaĵo aŭ 6.6 kilogramojn da ovo aŭ 13.5 kilogramojn da fiŝoj aŭ 29.5 kilogramojn da faruno aŭ 36.2 kilogramojn da rizo. Tio estas en akra kontrasto kun la fluga altiĝo de varprezoj kaj la mizera vivo de la loĝantoj antaŭ la Liberiĝo. Maljunaj laborantoj de la aĉeta kaj disvenda kooperativo kaj komunumanoj konigis al ni pri tiama stato. La komunumo situas apud Dongting-lago. La akvosurfaco de la lago estis pli alta ol la tero, tial je ĉiu okazo de pluvego la akvo de la lago breĉis la digon kaj kaŭzis inundon. Multaj kamparanoj forfuĝis kaj la restantaj devis sin vivteni per kaptado de fiŝoj. Komercistoj ekspluatis ilin per altiĝo de rizprezo tiel ke la lastaj devis doni 5 kilogramojn da fiŝo kontraŭ 1 kilogramo da rizo. Komercistoj de salo profitegis ankoraŭ pli multe, ke kamparanoj devis doni 10 kilogramojn da rizo kontraŭ 1 kilogramo da salo. En tiaj cirkonstancoj kamparanoj baraktantaj kun la morto havis ekstreme malgrandan aĉetpovon. En tiu tempo la kamparanoj portis vestojn el ŝtofo teksita de ili mem kaj tre malmultaj havis veston el ŝtofo maŝinteksita. Nun la enspezo de la kamparanoj multiĝas jaron post jaro kaj ilia aĉetpovo kreskas senĉese. En 1974 la totala sumo de detalvendo de la aĉeta kaj disvenda kooperativo Ĉaki kreskis je 2.6-oblo kompare kun tiu de 1965. Tio spegulis novan altiĝon de la vivo de la kamparanoj.

## TUTKORE SERVI AL AGRIKULTURO

De multaj jaroj la aĉeta kaj disvenda kooperativo metas subtenadon al la agrikultura produkto sur la unuan lokon kaj atingis rimarkindajn sukcesojn en efektiviĝo de la orientilo elmetita de Prezidanto Maŭ Zedong "disvolvi ekonomion kaj garantii provizadon".

La naturaj kondiĉoj de la komunumo Ĉaki estas relative bonaj kaj konvenaj por disvolvi multflankan produktadon, sed en la pasinteco ĝi nur produktis grenon kaj kotonon. Por helpi produktajn taĉmentojn plenumi la orientilon "disvolvi ĉiuflankan produktadon kun grenprodukto kiel ĉefĉenero" la kamaradoj de la aĉeta kaj disvenda kooperativo sub la unueca gvido de la partia komitato de la komunumo faris enketadon pri la naturaj kondiĉoj de la tuta komunumo kaj ellaboris planon pri disvolvo de multflanka produktado. En la lastaj jaroj ili elektis ok produktajn

*Aĉetado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktoj*



taĉmentojn kiel eksperimentan bazlokon de multflanka produktado, sendis al ili ok kadrojn por akiri spertojn kaj poste disvastigi ilin en la tuta komunumo. Krom provizado de tiuj taĉmentoj per semoj kaj plantidoj kaj instruado de produktaj teknikoj al ili la kooperativo aparte atentis pri propagando de socialisma penso al kamparanoj kaj kritikado al kapitalisma spontanea tendenco kaj aktive kondukas kamparanojn en irado de socialisma vojo.

En la popola komunumo ĉiam ekzistas batalo inter la du linioj de socialismo kaj kapitalismo ĉirkaŭ la problemoj ĉu oni povas aranĝi sian produktadon laŭ ŝtata plano. Antaŭ kelkaj jaroj iuj produktaj taĉmentoj en la komunumo opiniis, ke "kulturado de kotono malpli profitigas ol tiu de melonoj", kaj aliaj taĉmentoj malgrandigis la kulturan areon de kotono, opiniante ke kulturado de grenplantoj estas pli bona ol tiu de kotono, kaj ne plenumis la taskon de liverado de kotono al la ŝtato. Kunagante kun la partia komitato de la komunumo la kamaradoj de la aĉeta kaj disvenda kooperativo ripetade faris socialisman edukon al la komunumanoj kaj dank' al tio la lastaj bone komprenis la signifon de kultivado de kotono por la revolucio. En la lastaj jaroj la kooperativo bone plenumis la taskon de aĉetado de kotono. Komence de ĉiu jaro ĝiaj laborantoj iris en bazajn unuojn kaj faris kontraktojn kun produktaj taĉmentoj por meti kolektivajn flankokupojn kaj tiujn de komunumanoj en la ŝtatan planon kaj jaron post jaro grandigis la kvanton de aĉetitaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj.

Ĉaki-komunumo abunde produktas fragmitojn, kaj multaj el ĝiaj membroj scipovas plekti matojn kaj kurtenojn el tio. Antaŭe ili entreprenis la plektadon individue kelkiam eĉ je neglekto de la agrikultura produktado. Post interkonsiliĝo la produktaj taĉmentoj kaj la kadroj de la aĉeta kaj disvenda kooperativo decidis meti la plektadon de matoj inter la kolektivajn flankokupojn, tiel ke la produktaj taĉmentoj povu unuece aranĝi la

matoplektadon de komunumanoj laŭ la ebleco de la laborfortoj en periodoj de la jaro. Tio ne nur akcelis la disvolviĝon de la agrikultura kaj flankokupa produktado sed ankaŭ firmigis la kolektivajn ekonomion, kaj ankaŭ la komunumanoj estas tre kontentaj.

Por rapide disvolvi la kolektivajn flankokupojn la kamaradoj de la kooperativo alportis de aliaj lokoj kvanton post kvanto da semoj, plantidoj kaj bonaj specioj de porkoj kaj kokoj por provizi produktajn taĉmentojn per ili. Ili eĉ turnis kune kun la komunumanoj dezertajn herbozajn montodeklivojn en te-ĝardenojn, kaj esploris kiel sukcese bredi bonajn speciojn de porkoj kaj kokoj. Dank' al ilia helpo la kultivado de ekonomiaj plantoj kaj bestobredado de la tuta komunumo rapide disvolviĝis. Nun sur antaŭe kalvaj montoj aperas multaj tearbaroj, taglilioj kaj arboj de senkerna mandarino; sur dezertaj terpecoj apud lagoj estas plantitaj morusarboj; kaj antaŭe neutiligataj akvoj estas uzataj por bredi fiŝojn kaj kultivi lotusojn. Komunumanoj plantis ankaŭ cedrelojn, ĉinajn sapiojn (*Sapium sebiferum*), bambuojn kaj diversajn fruktarbojn ambaŭflanke de kanaletoj kaj vojoj aŭ ĉirkaŭe de domoj. Multaj produktaj taĉmentoj disvolvis kolektivajn bredadon de porkoj, anasoj, silkraŭpoj kaj starigis bredejon de bonspeciaj kokoj. La disvolviĝo de tiuj produktadoj ne nur firmigis la kolektivajn ekonomion kaj altigis la enspezon de komunumanoj sed ankaŭ pli kaj pli prosperigis la kamparan komercon. La totala enspezo de multflankaj produktadoj en la tuta komunumo Ĉaki kreskis de 1,490,000 juanoj en 1965 ĝis 2,840,000 juanoj en 1974, nome, la valoro de la agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj meznombro venditaj de ĉiu komunumano al la ŝtato kreskis de 45 ĝis 100 juanoj. La aĉeta kaj disvenda kooperativo ĉiujare superplenumis la taskon de aĉetado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj vendado de varoj. Ĝiaj laborantoj diris kun profunda konvinkiĝo el sia propra sperto: "La kampara komerco povas malfermi por si riĉan fonton de varoj kaj garantii la pro-



vizado nur se oni metis sian atenton kaj sian ĉefan forton sur la helpado al kamparanoj en pliigo de produkto.”

La aĉeta kaj disvenda kooperativo Ĉaki ĉiam persistas en servado al la agrikulturo. Por plenumi la bezonon en disvolvo de la agrikultura kaj flankokupa produktado ili multe pensis kaj klopodis por teni iniciativon en sia laboro. En vintro de 1972 la akvoni-velo en la Orienta Lago estis alta. Ili ekpensis ke se pluvegos en la venonta jaro, eble breĉiĝos la digo kaj okazos inundo. Kune kun la koncerna fako ili detale ekzamenis 13 kilometrojn longan parton de la digo kaj trovis ĉiujn danĝerajn lokojn. Tute kiel atendite, en junio de la sekvanta jaro, torente pluvegis, sed la digo estis sekurigita, ĉar ili ĝustatempe liveris materialojn bezonatajn en batalo kontraŭ la danĝera pluvego. La komunumanoj diris al ni, ke ĉiujare en kontraŭinunda batalo la oficistoj de la aĉeta kaj disvenda kooperativo ne nur ĝustatempe alportis necesan materialon al la fronto sed ankaŭ sendis siajn membrojn por partopreni en la batalo kune kun la komunumanoj.

En la pasintaj pli ol dek jaroj ili ĉiam persistis en sendado de varoj al vilaĝoj oportune al la amasoj. En printempo la komunumanoj estas tre okupataj kaj ne havas tempon por viziti vendejon, tiam laborantoj de la kooperativo iras en vespero al produktaj taĉmentoj por vendado. En someraj urĝaj semado kaj rikoltado, ili portas varojn al kampoj; vintre kiam komunumanoj entreprenas akvoutiligan konstruadon, ili alportas bezonatajn instrumentojn kaj ĉiutagajn vivbezonaĵojn al la konstruejo. Iuj produktaj taĉmentoj starigis registrolibrojn, laŭ kiuj la laborantoj de la kooperativo portis varojn rekte al la bezonantoj. Ĉen Zajbang, kadro de la partia filio de la kooperativo Ĉaki, ĉiuvintre kun kamaradoj sub sia gvido iras en vilaĝojn por ekzameni stalojn de bovoj kaj porkoj por scii kiaj materialoj estas necesaj por pasigi vintron, kvankam lia maldekstra okulo blindiĝis kaj lia dekstra okulo havas nur vidkapablon de 0.02; je festoj li kaj liaj

kolegoj sendas festajn bezonaĵojn al familianoj de martiroj, armeanoj kaj maljunuloj kiuj havas nek gefilojn nek laborkapablon; kaj en okupata tempo li kaj liaj kamaradoj kolportas de vilaĝo al vilaĝo. Tiel diligente la kadroj kaj laborantoj de la aĉeta kaj disvenda kooperativo klopodas por servi al la kamparanoj.

## NOVAJ RILATOJ INTER AGRIKULTURO KAJ KOMERCO

En la malnova Ĉinio fikomercistoj en la kamparo alprenis ĉiajn ruzaĵojn por trompe akiri monon de kamparanoj. Sed la komercaj laborantoj en la ĉina kamparo nun forigas per sia propra ago la kapitalismajn penson kaj stilon “ĉio por gajno de profito” kaj klopodas por starigi novajn rilatojn inter agrikulturo kaj komerco. Rilate al tio ni faris enketadon en Ĉaki-komunumo.

La komunumo abunde produktas kotonon. Distingi la kvaliton de kotono kaj pagi laŭ ĝi rekte koncernas la enspezon de komunumanoj. Rigore observante la politikon de la

*Sub la helpo de la aĉeta kaj disvenda kooperativo multaj produktaj taĉmentoj disvolvas bredadon de anasoj.*



ŝtato pri pago laŭ kvalito, la oficistoj de la kooperativo absolute ne permesas atenci la interesojn de kamparanoj per subtakso de la kvalito kaj malaltigo de la prezo. Se ili trovis dum aĉetado de kotono ke produktaj taĉmentoj difinis malalte la klason de kotono, ili iniciative altigis ĝin. Se ili mem faris eraron en tio, ili tuj ĝin korektis. Foje la kooperativo aĉetis kvanton da kotono laŭ specimenoj donitaj de la supera instanco. Kiam la kotono estis portita al fabriko, laborantoj de la fabriko opiniis ke ĝia kvalito estas bona, altigis la difinitan klason kaj pagis monon aldone. Poste la monsumo estis donita al la kooperativo. La oficistoj opiniis ke la socialisma komerco devas protekti la interesojn de la amasoj. Post reguligo de la kontoj dum pli ol unu monato ili fine pagis 5,300 juanoj aldone al la koncernaj produktaj taĉmentoj.

La oficistoj de la kooperativo ĉiam klopodas por la bono de la komunumo kaj brigadoj helpante ilin en disvolvo de produktado kaj malpliigante ilian elspezon. Foje post enketado ili trovis ke multaj produktaj taĉmentoj elspezis relative grandan sumon por aĉeti kemian sterkon kaj insekticidon. Por redukti ilian elspezon ili starigis eksperimentan fabrikan de kemia sterko kaj insekticidoj, kaj sukcese faris insekticidojn kaj kemiajn sterkojn per lokaj materialoj kaj sovaĝaj plantoj. Krome ili elkulturis teknikistojn por produktaj taĉmentoj. Nun la lastaj jam povas fabrikigi kelkajn insekticidojn kaj kemiajn sterkojn.

Kunlabore kun trafikaj administrejoj ili ankaŭ aranĝis rektan transportadon de kemia sterko, insekticidoj kaj aliaj materialoj al produktaj taĉmentoj proksimaj al ŝoseoj kaj akvovojoj. Al la produktaj taĉmentoj, kiuj troviĝas fore de trafikaj linioj, ili transportis varojn al lokoj plej proksimaj al ili oportune al la komunumanoj. Samtempe per ĉelokaj aĉetado, pakado kaj forportado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj ili ŝparis grandan kvanton da laborfortoj kaj multan tempon por la komunumo kaj brigadoj.

En la lastaj jaroj ili faris ankaŭ riparadon de eluzitaj agrikulturiloj. En 1973 ili remuldis pli ol 500 sokojn kaj riparis multajn ŝprucigilojn, draŝajn maŝinojn, dispecigilojn kaj aliajn agrikulturilojn, kaj per tio ili ŝparis grandan sumon da mono por produktaj taĉmentoj.

La aĉeta kaj disvenda kooperativo tutkore servas al la amasoj, tial la lastaj ankoraŭ pli varme amas kaj zorgas pri sia aĉeta kaj disvenda kooperativo. En la lasta printempo kelkdek mil kilogramoj da kemia sterko devis esti tuj transportataj aliloken de Ĝubej, sed la ŝoseo estis parte netrafikebla pro akvoutiliga konstruado, kaj pro tio la laborantoj de la aĉeta kaj disvenda kooperativo tre maltrankviliĝis. Informiĝinte pri tio Tongfu, Lianhu kaj aliaj tri brigadoj tuj sendis 23 boatojn kaj 4 traktorojn por helpi ilin en transportado kaj rapide plenumis la taskon. La laborantoj de la kooperativo tre dankis ilin pro la helpo, sed la lastaj diris: "Ni estas de unu familio, do ne danku unu la alian! Se vi renkontos malfacilon, nur sciigu nin kaj ni tuj venos!"

Tie ni aŭdis ankaŭ jenan okazaĵon. En iu aŭtuno la kvina produkta taĉmento de Lianhu-brigado vendis kvanton da kotono. La kasisto de la aĉeta kaj disvenda kooperativo pagis 600 juanojn al la librotenisto de la kvina produkta taĉmento, sed pro okupateco la kasisto tiam forgesis depreni la fakturon. Post forpaso de kelkaj tagoj nova kasisto denove pagis laŭ la fakturo 600 juanojn al Caj Juking, la konservanto de la kvina produkta taĉmento. Post reveno al sia produkta taĉmento Caj donis la monsumon al la librotenisto, sed la lasta diris: "La monsumon mi jam ricevis!" Li pensis: "Tio estas havaĵo de la ŝtato kaj ni ne devas ĝin akcepti." Kaj li redonis la monon al la kooperativo.

El la menciitaj ekzemploj ni vidis ke la novaj socialismaj rilatoj inter agrikulturo kaj komerco ne nur rapidigas la disvolviĝon de la ĉina agrikulturo kaj industrio sed ankaŭ alportos pli grandan prosperon al la komerco de la urboj kaj la kamparo.



# Novaj rimedoj por kuraci brulvundon

**E**N la pasinta somero du gravaj brulvunditoj estis portitaj al la medicina taĉmento de iu regimento de la Pekina Trupo. Kuracistoj kaj flegistinoj unue ordigis la brulvundojn kaj poste ŝprucigis sur ilin medikamenton faritan de ili mem, kiu formis sur ili tuj poste maldikajn membranojn. Post tio ili ŝprucigis tian medikamenton je ĉiu 2-a aŭ 3-a horo kaj la krustaj membranoj fariĝis ĉiam pli fortikaj kaj efike gardis la organismojn de infektado de bakterio. Samtempe ili prenigis al la malsanuloj ĉinajn medikamentojn senfebrigajn kaj kontraŭtoksajn kaj taŭgan kvanton da antibiotiko, tiel ke neniam okazis infektiĝo sur la vundoj. Dank' al la zorgema

kuracado kaj flegado la vunditoj jam resaniĝis post nur kvardek tagoj kaj elspezo de malmulta mono por kuracado kaj medikamentoj, kaj iliaj organismoj bone funkcias kaj iliaj vizaĝoj ne deformiĝis.

Kiel kreiĝis tiuj novaj rimedoj por kuraci brulvundon? Ni rakontu de komenco.

## TROVO DE NOVA VOJO

Brulvundo estas unu el la kazoj oftaj. Post la Liberiĝo la esplorado kaj kuracado de nia lando pri brulvundo atingis grandan sukceson sub la zorgo de la Partio kaj la popola registaro. Tamen la kuracmetodo ankoraŭ ne rompis la limigon de la kondiĉoj de "senbak-



*Kuracistoj analizas malsanon.*

teria malsanulĉambro” kaj karaj medikamentoj. Tiu metodo ne nur ne povas esti ĝenerale aplikata en fabrikoj, minejoj kaj la vasta kamparo, sed ankaŭ ne konvenas al kuracado de grandnombraj brulvunditoj dum kampa militado. Depost la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio multaj medicinaj kaj higienaj fakoj diligente klopodas por plibonigi la kuracmetodon de brulvundo kaj levi ĝian efikon. La supre menciita medicina taĉmento estas unu el ili.

La taĉmento konsistas el 15 homoj, el kiuj nur 4 estas kuracistoj kaj la aliaj estas sanitaristoj, kiuj rekrutiĝis antaŭ nelonge kaj ne havas sperton pri kuracado de brulvundo. Kian vojon ili prenu por venki tiun malfacilon? Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ Zedong, ili decidis iri la vojon de ĉina kaj okcidenta medicinaj kombino por disvolvi la medicinan aferon de la patrolando.

Laŭ notoj pri kuracado de brulvundo per arboŝeloj en ĉinaj antikvaj medicinaj verkoj,

ili kolektis ŝelojn de multaj arboŝpecoj kaj faris kemian analizon al ili aparte. La analizo montris, ke iuj arboŝeloj certgrade entenas utilajn elementojn por kuraci brulvundon. Ili elektis unu el ili kaj prilaboris ĝin per memfarita instrumento. Post klopodo de pli ol duonmonato ili sukcese faris likvan medikamenton. Kiam ili ŝmiris ĝin eksperimente sur brulvundon de besto, la vundosurfaco rapide sekiĝis kaj formiĝis sur ĝi membrano, kiu estas bezonata por ŝirmi la vundon kontraŭ infektiĝo de bakterioj, preventi eksudon de korpa likvaĵo kaj akceli resaniĝon de la vundo. Ili nomas la likvan medikamenton “Ŝaŭŝang 1”.

Ĝuste tiam iu ŝoforo estis vundita de bolanta akvo. Pro neeltenebla doloro la vundito frotis la vizaĝon per mano tiel ke la haŭto defalis kaj likvaĵo sencese eksudis. La medicina taĉmento tuj ekagis por urĝa savado. Ili ŝprucigis “Ŝaŭŝang 1” sur la vizaĝon de la vundito. Post 24 horoj la vundo krustiĝis kaj post 72 horoj la vundo tute resaniĝis.



*Ĝang Guĵlan post 12-taga kuracado*

*Ĝang Guĵlan brulvundita*





Nenia postsigno restis sur la vizaĝo de la ŝoforo kun brulvundo de 2-a grado.

Post tio la medicina taĉmento resanigis aliajn kelkajn brulvunditojn, kio pruvis la efikecon de la nova medikamento.

### SENĈESA PERFEKTIGO EN PRAKTIKO

En la komenco de 1970, estro de la medicina taĉmento Mej Ŝanhua kaj alia kuracisto iris al najbara hospitalo por partopreni en kuna diagnozo. Tie en la kirurgia malsanulĉambro ili vidis brulvunditon kun pala vizaĝo. Tra ŝiaj bandaĝoj elpenetriĝis verda puso, kaj ŝi jam febris plurajn tagojn. Ŝia vundosurfaco estis ne tre granda, tamen la serioza infektiĝo multe gravigis ŝian kazon. Ili tuj ŝprucigis al ŝi "Ŝaŭŝang 1". Strange estis, ke post dekelkaj ŝprucigoj de la medikamento la diafana membrano sur la vundosurfaco restis ankoraŭ nefortika kaj ne povis regi la infektiĝon. En kio kuŝis la kaŭzo? Ili komparis la kazon de tiu pacientino kun tiuj de la aliaj resanigitaj: La vundoj de la aliaj malsanuloj estis freŝaj kaj neinfektitaj, tamen tiu de la nuna pacientino serioze infektiĝis. Por kuraci tiun kazon oni nepre devas fari alian novan medikamenton.

Ili vizitis veteranajn kuracistojn kaj farmaciistojn de la ĉina medicino kaj diligente lernis de ĉiuj spertuloj por malkovri altvaloraĵojn de la ĉina medicino. Ili elektis ŝelojn de aliaj du arbospecoj kaj faris el ili novan medikamenton "Ŝaŭŝang 2" kun granda efiko en mortigo de bakterioj.

Post ŝprucigo de "Ŝaŭŝang 2" sur la vundon, la piocianinaj baciloj estis rapide mortigitaj kaj la temperaturo de la malsanulino iom post iom normaligis. Post kuracado de 28 tagoj la mortanta pacientino resaniĝis.

Kvankam iom da sukcesoj estis akiritaj en preparado kaj klinika apliko de ĉinaj medikamentoj por kuraci brulvundon, tamen la eltrovitaj medikamentoj havas la mankojn nome kaŭzi portempan doloron al paciento dum



*La kuracita ŝoforo Ju Honghai vundita de bolanta akvo je la vizaĝo*

apliko. Por perfektigi ilin la medicinaj laborantoj de la taĉmento faris pluan esploradon en praktiko.

En la pasintaj kelkaj jaroj, post sukcesa farado de "Ŝaŭŝang 2", la nomita taĉmento, sur bazo de lerno de avangarda sperto de frataj unuoj, elfaris "Ŝaŭŝang 3" kiu havas certagradan efikecon de sendolorigo, "Ŝaŭŝang 4" kiu estas relative bonefika por forigi infektitan brulvundsurfaco kaj ungentojn kiuj povas trakti ulceran vundon kaj akceli falon de krusto de triagrada vundo. Ili ankaŭ direktis sian atenton al lernado de avantaĝoj de la okcidenta medicino kaj resumis principon de prenado de ĉinaj medikamentoj, nutrado kaj perfuzado kaj simplajn helpajn terapiojn en diversaj kazoj, tiel ke la novaj rimedoj akiris ankoraŭ pli bonan kuracefikon.

La aferoj disvolviĝas en kontraŭdiroj kaj la sciencoj antaŭenmarŝas en praktiko. En la lastaj jaroj, prenante la filozofian penson de Prezidanto Maŭ kiel armilon, la taĉmento diligente studis kaj uzis materian dialektikon kaj elmetis utilajn opiniojn kaj proponojn por la ĉina medicino en kuracado de brulvundo. Ekzemple, en prevento de ŝoko ili pledas por

ĝuste trakti la rilatojn inter “perdo” kaj “perfuzado” kaj prenas preventon de perdo de korpa likvaĵo kiel la ŝlosilan punkton; en prevento de infektiĝo ili pledas por ĝuste trakti la rilatojn inter internaj kaj eksteraj kaŭzoj, ne neglekti efikon de bakterioj sur brulvundo kaj ĉiamaniere plifortigi la organisman rezistivon de la malsanulo; en traktado de krusto de triagrada brulvundo ili proponis ĝuste trakti la rilatojn inter fortranĉo kaj defalo de krusto kaj preni la lastan kiel ĉefan metodon. Ili atentis kaj pri lernado de avantaĝoj de la okcidenta medicino kaj pri serĉado de nova metodo pli facile aplikebla.

### TUTKORE SERVI AL LA POPOLO

La novaj rimedoj por kuraci brulvundon trovis varman bonvenigon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La medicina taĉmento ricevis milojn da entuziasmaj leteroj laŭdantaj ilin. Iuj elmetis al ili novajn proponojn, aliaj sendis drogherbojn de ili mem kolektitajn kaj frataj hospitaloj sendis laboratoriajn raportojn pri iuj drogherboj. . . Tiuj valoraj subtenoj stimulis la taĉmenton kontribui pli multe al la popolo.

En la lastaj 5 jaroj ili iris al 18 provincoj, urbegoj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando por savi brulvunditojn.

En februaro de la kuranta jaro post kiam okazis tertremo en suda parto de Liaŭning-provinco de nia lando la taĉmento ĝustatempe sendis siajn medicinajn laborantojn al la plagita regiono. Atinginte la lokon, ili senprokraste rapidis al la hospitalo malgraŭ laciĝo. En pli ol 20 tagoj ili resanigis pli ol 50 brulvunditojn kune kun kamaradoj de la loka hospitalo. Krom ŝprucigo kaj prenigo de medikamentoj kaj injektado al pacientoj ili mem iniciate prenis sur sin flegadon. La vunditoj emocie diris: “Ni trovis en la kamaradoj de la medicina taĉmento valoran revolucionan spiriton, ili ja meritas la nomon de popolaj armeanoj!”

La medicinaj laborantoj de la taĉmento preferas mem suferi pli multe por malpliigi doloron de malsanuloj.

Por ekzameni la efikecon de “Ŝaŭŝang 2” la taĉmentestro Mej Ŝanhua faris sur sia mano brulvundon. Poste li ŝprucigis la medikamenton sur la vundon kaj observis la efikecon malgraŭ doloro.

Dum savado de pacientoj kun brulvundoj de tria grado 6 el la taĉmentanoj 11-foje lasis preni haŭton de sur ilia korpo kiam urĝe bezonata haŭto estis neakirebla.

En la lastaj jaroj la medicina taĉmento jam kuracis pli ol mil brul- kaj brog-vunditojn kaj tiujn de kemiaĵoj en hejmoj de kamparanoj, jurtoj de mongoloj, aliaj hospitaloj kaj sia simpla malsanulĉambro. Dank’ al ilia kuracado, brulvundo de dua grado ne postlasis cikatron, aktoro brulvundita je vizaĝo resurseniĝis post resaniĝo kaj 90% de la kuracataj kazoj de grandarea brulvundo sukcesis.

Pro sia tutkora servado al la popolo la medicina taĉmento estis laŭdata de la supera instanco kaj trovis profundan bonvenigon de la amasoj.

### Novzelanda esperantistino en Ĉinio

Kiel membro de la Novzelanda Instruista Delegacio por Viziti Ĉinion, la novzelanda esperantistino s-ino Joanna White flugis al Pekino je la 25-a de aŭgusto, 1975, por fari amikan vizitadon. Posttagmeze de la 28-a de aŭgusto ŝi vizitis la Esperantan Sekcion de la Fremdlingva Eldonejo de Pekino kaj faris intiman kaj amikan interparoladon kun laborantoj de la sekcio. La kunsidon ĉeestis ankaŭ kelkaj laborantoj de la Redakcio de El Popola Ĉinio kaj la Esperanta Sekcio de Guozi Shudian. Ni dankas s-inon White, ke ŝi portis la amikecon de la novzelandaj popolo kaj esperantistoj al la ĉinaj popolo kaj esperantistoj, kaj samtempe ni petas ŝin transdoni niajn salutojn al ili.



# Senhalte sur la revolucia vojo

— Pri kamarado Hiaŭ Fej, maljuna  
ruĝarmeano



*Kamarado Hiaŭ Fej (la dekstra) en laboro*

**K**AMARADO Hiaŭ Fej nun havas 63 jarojn kaj antaŭe estis vickomandanto de la Jili-a Milita Subregiono de la Hingiang-a Trupo. Li aliĝis al la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo en 1930 kaj al la Kompartio en 1931. Li plurfoje ricevis premion laŭmerite, naŭfoje vundiĝis kaj hodiaŭ ankoraŭ restas tri splitoj de obuso en lia korpo. En la jaro 1970, li forlasis la postenon pro malsano kaj fikse loĝiĝis en Gi-an de Gianghi-provinco.

## I

Post ripetada studo de la teorio pri la diktaturo de la proletaro, kamarado Hiaŭ Fej akiris konon pri jenaj punktoj: La reakcia prediko distrumpetita de la ekspluataj klasoj, ke homo devas “iri malproksimen por ĉasi famon kaj potencon” kaj “reveni al sia hejmloko kun oro kaj brila titolo por glorigi siajn praavojn”, estas tokso por korodi la revoluciulojn kaj ke ĝi estas produktaĵo de la sistemo de privata posedanteco ekzistinta dum miloj da jaroj. La revoluciuloj devas ĝisfunde rompi kun la tradiciaj konceptoj. La kompartianoj estas fidelaj servantoj de la popolo. Antaŭe li aliĝis al la Ruĝa Armeo kaj revoluciis por la interesoj de la laboranta popolo. Nun, post forlaso de la posteno li ankoraŭ estas servanto de la popolo kaj devas tutanime servi al la popolo kaj absolute ne

fariĝi privilegiulo. La kompartianoj nepre devas konservi la stilon de luktado en malfaciloj, la viklecon kaj revolucionan spiriton de la jaroj de la revoluciaj militoj, ne devas senfare ĝui la “feliĉon” donitan de la popolo, sed devas esti servantoj de la popolo dum la tuta vivo, kiel ajn altan postenon ili okupas, kiom ajn longe ili laboris por la revolucio, kaj ĉu ili estas en posteno aŭ ne. En ripetadaj instruoj de la revoluciaj instruistoj, kamarado Hiaŭ Fej trovis principon por sia agado post la elposteniĝo kaj pli konscie direktas sian agadon per la revolucia teorio. Li skribis, en sia notlibro, jenajn vortojn: “Estu servanto de la popolo dum la tuta vivo kaj ne senfare ĝuu la ‘feliĉon’ donitan de la popolo”, por teni tion en sia cerbo kaj praktiki en sia agado.

Foje, kiam kamarado Hiaŭ Fej informiĝis ke la ŝosea sekcio de Tajhe-gubernio asfaltas straton, li decidis partopreni en tiu socialisma konstruado. Li iris al la konstruejo kaj ĝoje eklaboris kune kun la laboristoj. Laŭ la bezono de la konstruejo, li marteladis, vektportis sablon kaj puŝis ĉaron. Post kelkaj tagoj, kiam la laboristoj informiĝis, ke li estas emerita ruĝarmeano volontule partoprenanta en la laboro, ili sincere diris al li: “Maljuna kamarado, vi estas grandaĝa, multe penlaboris por la revolucio kaj via sano estas ne forta, do ne plu laboru kun ni

kaj bone ripozu.” Kamarado Hiaŭ Fej prenis ŝtoneton de sur la tero kaj diris: “Sur la longa vojo de socialisma konstruado, mi similas al tiu ĉi ŝtoneto. Ankaŭ mi devas labori kiel vi ĉiuj.”

Kamarado Hiaŭ Fej ĉiam rigardas sin kiel ŝtoneton por pavimi socialisman vojon. Kiam ŝoseo kaviĝis, li vektoportis gruzon kaj ĝin riparis. Kiam necesejo estis malpura, li ĝin purigis per balailo. Kiam traktoro dronis en kampo kaj ne povis eliĝi, li ĝin puŝis kaj tiris kune kun komunumanoj. Kiam infano aŭ maljunulo de najbaro malsaniĝis, li meminciate alvenigis kuraciston kaj aĉetis medikamenton por ili. Kamarado Hiaŭ Fej aperis inter amasoj kiel ordinara laborulo kun komunisma spirito.

## II

En vintra komenco de 1971, kiam kamarado Hiaŭ Fej aŭdis, ke oni konstruos akvokonservejon ĉe Laŭjingpan de Bajjun-monto en Tajhe-gubernio, kie la Ruĝa Armeo siatempe faris intensan batalon en la dua kontraŭ-“ĉirkaŭekstermado”, li tre emociiĝis. La batala sceno sur Bajjun-monto dum la dua kontraŭ-“ĉirkaŭekstermado” denove aperis antaŭ liaj okuloj. Li pensis: “En la pasinteco nemalmultaj ruĝarmeanoj oferis sian vivon por frakasi la ‘ĉirkaŭekstermadon’ de la malamikoj kaj defendi la lokon. Hodiaŭ oni konstruos tie akvokonservejon, mi nepre iros al la antaŭa batalejo kaj partoprenos en la konstruado.”

En la sekvanta tago, li piediris dek kilometrojn kaj petveturis al la konstruejo en kamiono. Li ĉiutage laboris kun la konstruantoj kaj ĉiam en plej peniga loko. Dum la konstruado, Sanfeng-brigado renkontis malmolegan roktavolon en sia sektoro, kio malrapidigis la konstruadon. Kamarado Hiaŭ Fej tuj iris al tiu loko kaj laŭte diris al la konstruantoj: “Kamaradoj, la ruĝarmeanoj ĉi tie batalis siatempe, ili ekstermis malamikojn kun nerezistebla potenco. Hodiaŭ, kiam ni konstruas ĉi tie la akvokonservejon, ankaŭ ni devas same venki ĉiajn malfacilojn kaj

danĝerojn.” Laŭ konsilo de kamarado Hiaŭ Fej la partia filio de la brigado rapide organizis sturman taĉmenton, eksplodigan grupon kaj danĝerforigan grupon por pli bone plenumi la taskon. Tage, kamarado Hiaŭ Fej laboris kune kun la konstruantoj kaj nokte organizis la amasojn al studo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. Kuraĝigate de kamarado Hiaŭ Fej, la kadroj kaj komunumanoj de Sanfeng-brigado unuanime atakis la roktavolon kaj en 7 tagoj plenumis la taskon, kiu devis esti plenumita en 10 tagoj. La konstruantoj ĝoje diris: “Se vickomandanto Hiaŭ gvidas nin en batalo, ĉiujn malfacilojn ni do povas venki.”

Tiamaniere, kamarado Hiaŭ Fej kaj la konstruantoj de Sandu-komunumo kune laboris du monatojn en la konstruejo. Antaŭ la Printempa Festo, nur post kiam la konstruantoj revenis al sia hejmo grupo post grupo, kamarado Hiaŭ Fej foriris kune kun la lastaj konstruantoj. Tiutage neĝegis, kaj kiam li paŝis en sian domon kun vestoj kovritaj de neĝo, ostecaj vangoj kaj manoj plenaj de kaloj, lia edzino diris domaĝe: “Maljunulo, la Partio kaj Prezidanto Maŭ volas, ke vi ripozu, do vi devas ripozi senzorge kaj ne malbonigi vian sanon per laciga laboro, por vidi la socialismon je multaj jaroj.”

Kamarado Hiaŭ Fej trovis, ke la diro de la edzino ne pravas kaj serioze diris al ŝi: “Kvankam mi emeritiĝis, tamen mi ankoraŭ ne tute perdis laborkapablon. Mi estas kompartiano, se mi nur havas iom da forto, mi laboros por socialismo kaj ne rigardos ĝin starrante senfare.”

Sandu-komunumo havas porkobredejon, kies pli ol 20 laborantoj bredis pli ol 100 porkojn kaj kulturis pli ol 20 muojn da kampoj (1 muo = 1/15 hektaro). Kamarado Hiaŭ Fej informiĝis, ke al tiu porkobredejo aperis malfaciloj kaj problemoj, kaj decidis iri tien por labori kaj doni helpon en solvado de la problemoj. Li elektis 1.5 muojn da kampo malmola kaj malvarma por eksperimentado. Ĉiumatene kamarado Hiaŭ Fej kolektis fe-



kajon ĉirkaŭ la porkobredejo malgraŭ vento kaj pluvo, aŭ varmego en somero aŭ frostoj en vintro. La fekaĵo kolektita de li en unu jaro sufiĉis por sterki ne nur lian eksperimentan kampon, sed ankaŭ aliajn rizkampojn. En pli ol unu jaro en la porkobredejo, kune kun la laborantoj li plantis printempe rizplantidojn, somere irigaciis turnante norion kontraŭ trosekeco, aŭtune rikoltis rizon kaj vintre erpis kaj plugis kampojn. Kaj krome li ankaŭ kuiris porkmanĝaĵojn kaj purigis la porkostalojn kune kun la bredistoj. Kamarado Hiaŭ Fej suferadas de malalteco de sangsukero. Ankaŭ lia galveziko estis fortranĉita. En lia mano, piedo kaj abdomeno ankoraŭ estas splitoj de obusoj. La laborantoj de la porkobredejo zorgis pri la sano de kamarado Hiaŭ Fej, ofte admonis lin ripozi, deprenis lian portvekon kaj kaŝis liajn laborilojn. Kamarado Hiaŭ Fej rigardis la zorgadon de la klasfratoj kiel forton por stimuli lin al daŭrigo de la revolucio. Iufoje, kamarado Hiaŭ Fej malvarmumiĝis kaj febris, kio iom kaŭzis al li recidivon de malalteco de sangsukero. La laborantoj de la bredejo ne permesis al li labori, sed post preno de tablojdoj li denove iris kun ŝovelilo al kampo. Laborantoj diris domaĝe: "Vickomandanto Hiaŭ, via korpo ja ne estas farita el fero, kiel vi povas labori kun malsano?" Ili deprenis de li la ŝovelilon kaj diris ke li reiru hejmen por ripozo kaj kuracado. Tamen li ne konsentis kaj ridetante diris: "Antaŭe malgrave vundiĝinte en batalo oni ne forlasis la batalfronton. Hodiaŭ en konstruado de socialismo, kiel mi povas ripozi en la domo kun negrava malsano? Por ŝanĝi la fizionomion de nia porkobredejo ni devas labori pene."

Sub edifo de kamarado Hiaŭ Fej, profunde ŝanĝiĝis la spirita fizionomio de la laborantoj de la porkobredejo. La nombro de la bredataj porkoj kaj la produktokvanto de greno multe kreskis. En resumado pri sia laboro de pli ol unu jaro en la bredejo, kamarado Hiaŭ Fej skribis en sia taglibro: "Ŝpatotenilo estigis kalojn al miaj manoj, vektoportado estigis veziketojn al miaj plan-

doj, la suno brunigis mian haŭton, ŝvito tralmalsekigis la vestaĵojn, kaj forlaviĝis miaj burĝaj pensoj kaj altiĝis mia proleta konscio".

### III

Kamarado Hiaŭ Fej naskiĝis en malriĉkamparana familio ĉe la piedo de Gingsangmontaro. En la aĝo de 8 jaroj li transprenis de sia patro la "portvekon de jardungito" kaj laboris 8 jarojn kiel dungito. En la 8 jaroj plenaj de mizero kaj suferoj, la hundoj kaj vipoj de bienuloj kaj tiransinjoroj havigis multajn cikatrojn al lia infana korpo. En la jaroj de la revoluciaj militoj, la kuomintangaj reakciuloj kaj la japanaj agresantoj restigis splitojn de obuso en lia korpo. Kamarado Hiaŭ Fej neniam forgesis la vundojn faritajn al li de la malnova socio kaj senĉese sin stimulis al pena laborado por la Partio kaj la popolo.

Marks diris ke la socialisma socio "**ankoraŭ portas postsignojn de la malnova socio ĝin naskinta**". En la historia periodo de socialismo ankoraŭ troviĝas grundo, el kiu ĝermas kapitalismo kaj burĝoj. En la kamparo, parto de etproduktantoj kaj riĉaj kamparanoj ĉiam deziras pligrandigi la spontanegan forton de kapitalismo, laŭ la malnovaj "kutimoj" kaj per mono, komercaĵoj, metio kaj parcelo rezervata por privata uzado en iliaj manoj. Ĝuste kiel Lenin asertis, "**la etproduktado konstante, ĉiutage kaj ĉiuhore, spontanee kaj grandkvante kreskigas kapitalismon kaj burĝojn**". Kiel kompartiano batalanta por komunismo dum la tuta vivo, kamarado Hiaŭ Fej aktive propagandas socialisman penson kaj kritikis kapitalisman tendencon por ŝanĝi la fizionomion de la kamparo.

La tria produkta taĉmento de Sandu-brigado najbare de la porkobredejo de la komunumo troviĝas tuj apud la urbeto Sandu. Ĝia kapitalisma tendenco antaŭe estis serioza en "forlaso de agrikulturo kaj entrepreno de flankokupoj". Iuj komunumanoj de la taĉmento ofte iris aliloken por perlabori monon, kio serioze influis la kolektivajn produkta-

don. Kamarado Hiaŭ Fej decidis helpi la trian taĉmenton ŝanĝi tiun postigintecon, bone plenumante la laborojn en la porkobredejo.

En la komenco de printempo de la lasta jaro, kamarado Hiaŭ Fej venis al la tria taĉmento. Li tage laboris kune kun la komunumanoj kaj vespere vizitis familiojn de komunumanoj por fari socian enketon. Post klara kono de la stato, li proponis al la taĉmento okazigi kunvenon de kadroj, organizi la amasojn por serioze lerni la instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio pri kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, lerni la fundamentan linion de la Partio, eksponi faktojn de kapitalisma tendenco en la taĉmento, mobilizi la amasojn al profunda kritiko kontraŭ la reviziismo de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ sur la draŝejo, kampoj kaj en la vespera politika lernejo kaj kritiki la kapitalisman tendencon de “forlaso de agrikulturo kaj entrepreno de flankokupoj” por plie altigi la konscion de la amasoj en klasa batalo kaj batalo inter la du linioj. Sur tiu bazo, li proponis al la taĉmento okazigi kunvenon de komunumanoj por diskuti jenajn problemojn: “Kien la ĉaro devas esti tirata? Kie la laborfortoj devas esti uzataj?” Kamarado Hiaŭ Fej klarigis al la amasoj per facile kompreneblaj diroj: “La ĉaro estas ne granda, sed kien oni devas ĝin tiri? Se vi forlasas agrikulturajn laborojn kaj tutjare tiras ĝin al aliaj lokoj por perlabori monon per transportado de varoj, tio signifas, ke vi tiras la ĉaron sur la kapitalisman vojon. Se

oni servigas la ĉaron al la kolektiva produktado por disvolvi la socialisman kolektivitan ekonomion kaj helpi la konstruadon de la lando, tio signifas ke li tiras la ĉaron sur la socialisma vojo. Ni estas konstruantoj de socialismo, kaj ni devas tiri la ĉaron ne sur la kapitalisman eraran vojon, sed sur la larĝan socialisman vojon!” La parolado de kamarado Hiaŭ Fej forte edifis la amasojn. Ĉiuj kiuj klopodadis ekstere por gajni monon promesis, ke ili elfosos sian kapitalisman penson kaj tutkore iros la socialisman vojon. En kelkaj tagoj, la taĉmento revenigis ĉiujn laborfortojn, kiuj ekstere entreprenis flankokupojn. En la taĉmento rapide disvolviĝis la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo. En tiu jaro, la kadroj kaj la komunumanoj sub la helpo de kamarado Hiaŭ Fej senĉese kritikis kapitalisman tendencon, pene luktis kontraŭ malfaciloj kaj finfine ŝanĝis la postigintan fizionomion. Eĉ post serioza fiinsekta katastrofo, la taĉmento pliproduktis 7,000 kilogramojn da greno kaj unuafoje vendis kvanton da superbezona greno al la ŝtato.

Kamarado Hiaŭ Fej ofte rakontis al la kadroj kaj amasoj, kiel la kadroj de la soveta regiono siatempe faris tage revolucion en sandaloj kaj vespere iris montvojon por viziti malriĉkamparanojn. Li rakontis al ili ankaŭ pri la glora tradicio de egaleco inter la oficiroj kaj soldatoj, inter armeanoj kaj popoloj kaj instigis la kadrojn kaj amasojn tutkore fari socialisman revolucion.

*Nova Esperanta Eldonaĵo*

**Brilanta Ruĝa Stelo** (*bildrakonto*)

118 p. 18.4 × 12.2 cm

Prezo: £0.08 US\$0.20

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj),  
Pekino, Ĉinio

Mendu ĉe la lokaj perantoj, aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de  
GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

## Serĉi perdintojn

**T**UN tagon antaŭ unu jaro, en la Pekina Stacio trajno baldaŭ ekveturos al Nankino. En atendejo por pasaĝeroj iu maltrankvile serĉadis ion. Subite oni alvokis en megafono: “Kamarado Ĝoŭ Kiguan, kamarado Ĝoŭ Kiguan, tuj al la disaŭdiga stacio. . .” La serĉanto ĝuste estis Ĝoŭ Kikuan. Li estas laboristo de la Nankina Brakhorloĝa Fabriko kaj vojaĝis al Pekino pro laboro. Li perdis siajn monujon kaj la fervojan bileton, kiujn iu elementlerneĵano trovis kaj transdonis al la Pekina Fako por Perditaj Objektoj. Laboranto de la fako trovis en la monujo monojn, oficlegitimilon kaj fervojan bileton por tiu tago. Ĝis ekiro de la trajno restis nur 3 horoj. La fako tuj sendis personon al la fervoja stacio kun la monujo. Kiam oni redonis la monujon al Ĝoŭ Kiguan, li firme premis la manon al la laboranto de la fako kaj ne sciis kion diri en emociiĝo.

Por serĉi perdintojn la Pekina Buroo de Publika Sekureco starigis socian servon — la Pekinan Fakon por Perditaj Objektoj. Ĝi lokiĝas sur la movoplana strato Hidanbej. En vicoj da vitrinoj montriĝas brakhorloĝoj, monujoj, radioaparatoj, fotiloj, okulvitroj, fontoplumoj, novaj ŝuoj, ŝtofoj kaj lanfadenoj. . . El ili iuj estis alsenditaj de amasoj kaj aliaj de koncernaj unuoj. Gvidanto de la fako Ĉen Ŝaŭĉang diris al mi, ke multaj fabrikoj, minejoj, lernejoj, teatroj, parkoj, bazaroj kaj stacioj en Pekino starigis fakon por perditaj objektoj. Ekz. la fako por perditaj objektoj en la magazeno Vangfuging en la movoplana komerca centro ĉiujare ricevis ĉ. dekmil perditajojn, el kiuj plejparto estis redonita al la perdintoj, kaj la restantaj, kies perdintojn oni ne trovis en difinita tempo, estis transdonitaj al la Pekina Fako por Perditaj Objektoj. Nur en la jaro 1974 sola la nomita fako redonis al perdintoj pli ol 2,400

juanojn, 82 brakhorloĝojn, 152 mansakojn kaj pli ol 4,800 diversajn pakaĵojn, vestaĵojn k.a.

La laborantoj de la fako tre zorge konservas la perditajojn: Ili ofte sunumas lanvestojn kaj peltaĵojn kaj kontrolas kaj riparas brakhorloĝojn kaj radioaparatojn. La fako ankaŭ okazigas montradon de la perditajoj, por ke oni povu rekoni kaj repreni sian perditan objekton. Se iu perdinto ne trovis sian perditan objekton en la fako, li povas registri sian perditan objekton en registrolibro, por ke la laborantoj helpu serĉi tiun poste. Je la komenco de la kuranta jaro, veterana laboristo Jan Ĉanggiang, membro de Hejlonggiang-provinca vizita grupo al Daĝaj-brigado, perdis dum restado en Pekino sian monujon kun pli ol 200 juanoj. Li registris tion ĉe la fako kaj forveturis kune kun la grupo. Post nelonge li estis sciigita, ke lia monujo estis trovita. La monujo estis trovita de Tan Hiuĝen, laboristino de iu fabriko de elektraĵ instrumentoj, sur la strato Kianmen. Ricevinte sian monujon kun la monsumo, Jan Ĉanggiang diris emocie: “En la antaŭliberiĝa Pekino rabistoj estis tiel senbridaj, ke ili rabis irantojn sur stratoj, kuomintangaj policianoj, kanajlaj kaj rabistaj klikoj faris en komploto ĉiajn malbonojn. Nun en Pekino, la ĉefurbo de nia socialisma patrolando oni rigardas helpon al aliuloj kiel plezuron. La laborantoj de publika sekureco tutanime servas al la popolo kaj serĉas perdintojn per diversaj metodoj. Kiel frapante kontrastas la nova socio kun la malnova!”

La laborantoj de la fako ne nur atendas en sia oficejo la perdintojn venantajn rekoni kaj repreni ilian perditajojn, sed ankaŭ ĉiamaniere klopodas por trovi la perdintojn. Kiam ili trovis sur perditaj objektoj la nomon kaj adreson de la perdintoj, ili tuj sciigis ilin.



La 10-an de junio de 1974, la fako ricevis perditan brakhorloĝon kaj post unu monato neniu venis rekoni ĝin. Poste laborantoj de la fako trovis sur la interna flanko de la dorsa kovrilo de la brakhorloĝo jenajn skribaĵojn: "2-38, la 21-an de marto 1973". Ili konjektis, ke la skribo probable estis farita de horloĝisto de riparejo. Post multfojaj pridemandoj ili fine trovis la riparejon kaj poste trovis en la duplikataro la adreson de la perdinto, kiu estis soldato de ĈPLA Feng Hiaŭping. La 12-an de julio la brakhorloĝo kiu perdiĝis unu monaton estis redonita al la perdinto.

Alifoj, laborantoj de la fako trovis en iu monujo slipon kun la noto "Li Fengkin, A-2-4, strato Sanlihe". Kiam popolaj policanoj trovis Li Fengkin laŭ la adreso, ŝi tamen diris, ke ŝi nenion perdis. Kiam la policanoj montris al ŝi la monujon, ŝi diris, ke ŝi antaŭe ne vidis tiun monujon. Nur kiam ŝi vidis la slipon, ŝi ekmemoris, ke la noto estas skribita de ŝia amikino Vu Lanhiang. La policanoj do iris al la lasta, sed tiu ankaŭ diris ke ŝi ne perdis ion. La venantoj petis ŝin rememori, ĉu iu ajn el ŝiaj konatoj uzis tian monujon. Vu Lanhiang fine ekmemoris, ke tian monujon uzis ŝia patrino, kiu venis al Pekino por ŝin viziti. Plua enketo konstatis, ke la monujo estis vere de la patrino de Vu Lanhiang.


La laborantoj de la fako, kiuj tutkore servas al la popolo, estis profunde amataj de la

amasoj. En la pasintaj jaroj ili ricevis multajn dankajn leterojn el diversaj lokoj de la patrolando. Sed ili diris: "Ni estas nur perantoj inter la trovintoj kaj perdintoj, kaj oni devas danki la honestajn trovintojn."

En la nova Ĉinio oni jam tute kutimiĝis redoni trovitajn objektojn, kaj ankaŭ geknaboj kreskas en tia moro. En la fino de la pasinta jaro lernantinoj Ju Ŝengping kaj Jang Jumin de la Pekina 154-a Mezlernejo trovis monujon sur la vojo al la Zoologia Ĝardeno, en kiu estas pli ol 80 juanoj kaj aliaj objektoj. Ili donis ĝin al la proksima policejo. La monujo estis perdita de Vang Ĝaŭmin de la Harbina Unua Konstrua Kompanio dum vojaĝo al Pekino. Tion eksciis la instruistoj kaj familianoj de la du knabinoj, nur post kiam la lernejo ricevis dankan leteron de la perdinto. Oni demandis Ju Ŝengping kaj Jang Jumin: "Kial vi ne diris tion al la lernejo?" Ili respondis: "Tio estas farenda. La instruistoj kaj gepatroj ofte edukas nin, ke ni donu trovitan perditajn al la koncerna fako kaj ne proprigu alies objekton eĉ malgrandan, kaj estu bonaj lernantoj de Prezidanto Maŭ."

Supre ni raportis al niaj legantoj nur kelkajn el la multnombraj aferoj de la Pekina Fako por Perditaj Objektoj, sed ili brilas per la nova moralo kaj nova moro de la socialisma Ĉinio.

*Vej Jaŭ, lernanto de la 36-a Mezlernejo de Pekino, donas trovitan monon al la Pekina Fako por Perditaj Objektoj.*





## Vjetnama elefanto en Pekino



Lastatempe Pham Van Dong, ĉefministro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, donacis elefanton al la Pekina Zoo.

Je la 2-a de julio okazis akcepta ceremonio en Pekino. Nguyen Trong Vinh, ambasadoro de la Vjetnama Demokratia Respubliko al Ĉinio, kaj Jang Ŝouŝan, vicestro de la Revolucia Komitato de Pekino, faris paroladojn en la ceremonio, esprimante komunan deziron plifortigi la fratecon kaj unuiĝon inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio.

La 16-jara elefanto nomata Khan Chiem pezas 2.250 kilogramojn. Ĝi atingis Pekinon en la 1-a de julio eskortite de vjetnamaj kamaradoj.

Post kiam Khan Chiem venis al la Pekina Zoo, plimultiĝis ĝiaj vizitantoj. Antaŭ la domo de la elefanto ofte svarmis vizitantoj, inter kiuj multaj venis speciale por ĝin vidi. Dresisto diris, ke Khan Chiem estas tre saĝa kaj baldaŭ alkitimiĝos al la nova medio. 4-5 tagojn post kiam ĝi venis al la Pekina Zoo ĝi jam lasis la ĉinajn dresistojn proksimiĝi al ĝi en nutrado, kaj dekkelkajn tagojn poste ĝi jam povis sin ekzerci kondukate de la dresistoj per la ĉina lingvo.

Khan Chiem ĝoje vivas ĉi tie. Ĉiumatene je la sepa kaj tridek minutoj, ĝi iras eksteren promeni. Ĝi tre ŝatas naĝi kaj pilkoludi. Kiam la dresisto jetis al ĝi pilkon, ĝi rebatis la pilkon per piedo. Ĝiaj interesaj movoj ofte vekis ridegon de spektantoj. Iam ĝi ekzumis per la rostro pro ĝojego.



# Ekspozicio de pentraĵoj

Je la unuajara datreveno de la fariĝo de amikaj urboj de Osaka kaj Ŝanhajo, oni antaŭ nelonge okazigis en la urbo Osaka de Japanio Ekspozicion de Pentraĵoj de Elementaj kaj Mezgradaj Lernantoj de Ŝanhajo-Osaka. La cent pentraĵoj de la ŝanhajaj geknaboj prezentas al la japanaj geamiketoj feliĉan vivon de la ĉinaj lernantoj kaj esprimas ilian deziron pri fortigo de amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. Samtempe por la ekspozicio oni elektis 100 el pli ol 2,000 pentraĵoj de 450 mezgradaj kaj elementaj lernejoj en Osaka. Tiuj spegulas lernadon, vivon, artan kaj korpan aktivadon de tieaj lernantoj kaj ilian deziron pri fortigo de amikeco inter Japanio kaj Ĉinio. La 200 pentraĵoj verkitaj de 6- ĝis 14-jaraj geknaboj de Ĉinio kaj Japanio altiris multajn rigardantojn kvazaŭ buntaj freŝaj floroj de amikeco.

Inter la pentraĵoj de la japanaj geknaboj troviĝis alloga afiŝo. Sur ĝi maldekstre estas desegnaĵo de Tian-anmen-pordego, dekstre desegnaĵo de la urbo Osaka kaj meze vortikaj linioj ligantaj la du desegnaĵojn, super kiuj estas skribitaj du ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj "Amikecon". La verkinto de la pentraĵo diris: "La pentraĵo estis plenumita en tri tagoj helpe de mia patrino. Ĝi plaĉas ankaŭ al la patro. La elmontrado de la pentraĵo multe kuraĝigis min. Mi nepre klopodos por plifortigi la amikecon kun ĉinaj geknaboj."

Iu japana rigardanto, kiu laboras en sindikato, diris: "La ekspozicio havas tre profundan signifon. La amikecaj semoj disŝutitaj de la maljuna generacio jam ekfloris." La floroj de amikeco pentritaj de la geknaboj de Ĉinio kaj Japanio certe pli kaj pli pompiĝos.

## La popoloj interligiĝas koro ĉe koro

De la 13-a ĝis la 25-a de junio okazis la Ekspozicio de Ĉinio en Kolonjo de la Okcidenta Germanio. La ekspozicio trovis varman bonvenigon de rigardantoj kaj ĝi estis vizitita de homoj el diversaj lokoj de la Okcidenta Germanio kaj okcidenta Berlino krom Kolonjo kaj ankaŭ el Britio, Francio, Nederlando, Belgio, Danlando, Svedio kaj Aŭstrio, entute je pli ol 190,000 homfojoj. Ili laŭdis la grandajn sukcesojn atingitajn de la ĉina popolo sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong. Multaj vizitantoj rigardadis ĝin plurajn horojn, iam eĉ unu tagon kaj iuj junuloj eĉ plurajn sinsekvajn tagojn. Iuj junulinoj montris grandan intereson pri la egalrajta pozicio de la virinoj de la nova Ĉinio.

Komisiite de siaj kunuloj de iu maljunula domo, iu aĝulo fotis ĉiujn ekspoziciajn objektojn por poste projekcii ilin al tiuj maljunuloj, kiuj ne povis veni viziti la ekspozici-

cion. Iu pli-ol-60-jara ŝipano rigardadis tutan tagon kaj diris: "Mi iam venis al Ŝanhajo en mia junaĝo. Tiam Ĉinio havis malmultajn maŝinojn kaj ĉiuj fizikaj laboroj estis plenumitaj ĉefe per homfortoj. La laboristoj multe ŝvitis, tamen ili ne povis vivteni sin. Nun vi jam povas fabriki tiel bonajn maŝinojn kaj mi elkore ĝojas pro viaj sukcesoj." Post firigardo al ĉina filmo *Batalo por Jungi Hajheriveron*, iu vizitanto diris: "La popoloj interligiĝas koro ĉe koro. Kvankam mi ne povoscias la ĉinan lingvon, tamen la ekspozicio rekte vidigis al mi grandan entuziasmon de la ĉina popolo en konstruado de la patrolando per la propraj fortoj." Iu virino emocie diris: "La popolo de Okcidenta Germanio simpatias la ĉinan popolon kaj volas pluapase disvolvi amikan rilaton kun Ĉinio."

La ĉina ekspozicio plifortigis interkompreniĝon kaj amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Okcidenta Germanio.





# La dungŝjang-oj

de ZONG MIN

**L**A dungŝjang-a nacieco konsistas el pli ol 162,000 membroj, el kiuj plejparto loĝas en la Dungŝjang-a Aŭtonoma Gubernio, Heĝeng-gubernio kaj la urbo Linhia de Gansu-provinco kaj malmultaj loĝas dise en la regiono de Lanĝoŭ kaj Dinghi.

En la komenca periodo de Juan-dinastio (1271-1368 p. K.) la praavoj de la dungŝjang-oj jam fiksloĝiĝis en la regiono de Heĝoŭ (nun Linhia) kaj Dungŝjang. Dum sia longtempa amika kunvivado kun huj-oj, influado unu al la alia kaj kuna disvolviĝado ĝi formiĝis memstara nacieco. Sed antaŭ la Liberiĝo, pro la nacistuprema politiko de la reakciaj regantaj klasoj en ĉiuj historiaj periodoj, la dungŝjang-oj ne estis rigardataj kiel unu nacieco, kaj pro tio ke ili loĝas en Dungŝjang de Linhia, ili estis nomataj Dungŝjang-aj huj-oj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio ili ricevis la oficialan nomon dungŝjang-a nacieco.

Antaŭ la Liberiĝo, kuomintang-aj reakciuloj senĉese kreis naciajn konfliktojn kaj praktikis sangan regadon super la dungŝjang-a popolo, en koluzio kun lokaj feŭdaj militaristoj kaj la reakcia reganta klaso de la dungŝjang-a nacieco en Gansu kaj Kinghaj. En ekonomio, ili kruele ekspluatis la dungŝjang-an popolon per peza rentumo kaj senpagaj servoj, pelante vastajn dungŝjang-ajn amasojn en mizeron. Por fari enlandan militon, la kliko de Ĉiang Kajŝek perforte kaptis popolanojn kiel rekrutojn aŭ transportistojn de jaro al jaro. Ekzemple, en la jaro 1948 oni forkaptis pli ol 3,000 virojn kiel rekrutojn en unu sola fojo en Dungŝjang, tio ne nur kaŭzis tragikan disiĝon de karuloj, sed ankaŭ rekte serioze malhelpis la agrokulturan produktadon pro nesufiĉeco de laborfortoj en la kamparo. En tiu tempo, multaj dungŝjang-aj kamparanoj bankrotis kaj

fariĝis proletoj en kamparo kaj iuj devis forvendi siajn gefilojn al bienuloj kiel servistojn.

Antaŭe la dungŝjang-oj estis islamanoj apartenantaj al la nova kaj malnova eklezioj. En lokoj koncentre loĝataj de dungŝjang-oj troviĝas multaj moskeoj, meznombre unu moskeo aŭ templo de islama episkopo por 30 familioj kaj unu imamo aŭ moskea koran-studento por 18 familioj. Diversaj religiaj pagoj ankoraŭ pli mizerigis la dungŝjang-an popolon. Tiutempe, la dungŝjang-oj havis nenian liberon en religia kredo. Kun feŭda religia privilegio en siaj manoj, la reakcia reganta klaso ekspluatis kaj subpremis la laborantajn popolanojn kaj ofte kreis konfliktojn kaj interbuciojn inter la dungŝjang-oj kaj inter ili kaj aliaj naciecoj, utiligante la religian diferencon inter ili. Post la Liberiĝo, la Partio kaj la popola registaro energie propagandis kaj efektivigis la politikon de libera kredo de religio, solvis la ekleziajn konfliktojn kaj plifortigis la solidarecon de la dungŝjang-oj. Sekve de la profunda disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj la impetado de la socialisma konstruado, la dungŝjang-aj popolanoj komprenis, ke la kaŭzo de iliaj malriĉeco kaj postigiĝinteco kuŝas en la malnova reakcia socisistemo de ekspluatado, ke la religia feŭda subpremado kaj la feŭda ekspluata sistemo nepre devas esti likviditaj, kaj nur tiamaniere la dungŝjang-oj povas plene sin liberigi.

Antaŭ la Liberiĝo, la laboremaj kaj kuraĝaj dungŝjang-aj popolanoj, same kiel la alinaciecaj popolanoj, faris armajn batalojn por sia liberiĝo, ne povante elteni kruelan klasan kaj nacian subpremado. Post la Opia Milito en 1840, eksterlandaj kapitalismaj fortoj trudiĝis en nian landon, kontraŭ kio la putra Kingdinastio siatempe aplikis nacivendan kapitu-

lacan politikon. Tio akcelis la batalon de la dungŝjang-a popolo kontraŭ King-dinastio kaj donis al tiu batalo karakteron kontraŭimperiisman kaj kontraŭfeŭdisman. En 1936, en sia Longa Marŝo, la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio trapasis la sudan parton de Gansu kaj disŝutis revoluciajn semojn inter la popolanoj diversnaciecaj. De tiam en la dungŝjang-aj regionoj fondiĝis sekreta organizo de la Komunista Partio de Ĉinio. En 1934, han-aj, huj-aj, dungŝjang-aj kaj tibetanaĵ kamparanoj en la suda parto de Gansu unuiĝe levis potencon insurekcion kontraŭ la reacia regado de Ĉiang Kajŝek kaj lokaj militaristoj. Ili sin organizis en "Kontraŭjapanajn Nacisavajn volontulojn" kaj bataladis en Lintaŭ, Kangle kaj aliaj dudek gubernioj en suda Gansu. Post la Liberiĝo, la dungŝjang-aj popolanoj fariĝis mastroj de la ŝtato. En la 25-a de junio, 1950, fondiĝis la Dungŝjang-a Aŭtonoma Gubernio kaj venke plenumiĝis tre demokratia reformo kaj socialisma transformo. Sekve de senĉesa gajno de venkoj en ekonomia kaj politika frontoj, precipe dank' al la hardado en la Granda Proleta Kultura Revolucio, kreskadas senĉese kadroj de dungŝjangnacieco. Nun granda parto el la gvidantaj kadroj de la Dungŝjang-a Aŭtonoma Gubernio en la niveloj de gubernio kaj komunumo kaj ankaŭ tiuj de fabrikoj kaj minejoj estis dungŝjang-oj. Ili estas ĉefaj fortoj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de tiu gubernio.

La Dungŝjang-a Aŭtonoma Gubernio situas sur ambaŭ bordoj de la Flava Rivero. En la gubernio estas altaj montoj, multaj ravinoj kaj longaj fosoj estigitaj de pluvakvaj torentoj. Antaŭ la Liberiĝo tie estis serioza erozio. Post la Liberiĝo, la dungŝjang-aj popolanoj firme decidis ŝanĝi la postigintan fizionomion de oftaj malabundaj rikoltoj en sia agrokulturo pro sekegeco, aktive entreprenis akvoutiligan konstruadon plene utiligante la superecon de popola komunumo kaj plantis arbojn por preventi erozion. En 1967 sukcese finkonstruiĝis la sistemo por konduki akvon de Taŭhe-rivero por irigaciado, kio ŝanĝis la staton de terura manko de akvo por irigacio. Dank' al tio, la totala produktokvanto de greno de la aŭtonoma gubernio en 1971 estis 2.5-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo. Daban-brigado de tiu gubernio kun tre malbonaj naturaj kondiĉoj ĉiam estiĝis en agrokul-



turo. Sed dank' al stimulo de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la kadroj kaj amasoj, plene luktante, konstruis kampojn sur ŝtonamasoj, fosis irigacian kanalon kun longeco de 10 kilometroj kaj plivastigis la areon de irigacieblaj kampoj. En 1972, la brigado akiris pohektan produktokvanton de greno de pli ol 6 tunoj kaj fariĝis unu el la avangardaj unuoj de Gansu-provinco en agrokulturo.

La dungŝjang-oj okupiĝas ĉefe pri agrokulturo. Ili kulturas ĉefe terpomojn, tritikon, sekalon, hordeon, milion kaj maizon. Ili ankaŭ bredas brutojn, plejparte ŝafojn. Nun en la Dungŝjang-a Aŭtonoma Gubernio troviĝas elektrejo, fabrikoj de agrokulturiloj, cemento kaj kemia sterko kaj ŝoseoj kiuj ligas la gubernion kun la aliaj partoj de nia lando.

En la longa disvolviĝado en la pasinteco, la dungŝjang-oj kreis siajn proprajn kulturon kaj arton. Ilia popolkanto nomata *huaer* (floroj) vaste cirkulas inter la laborantaj popolanoj, kaj la *huaer*-melodio kun klara kaj alta tono estas ĉarma. En la gubernio ofte okazas arta festivalo kaj multaj dungŝjang-oj kreis simplajn sanajn dancojn kun propra nacia karakterizaĵo. La ensemblo de la gubernio partoprenis festivalojn de la Linhia-a Huj-a Aŭtonoma Subprovinco kaj de Gansu-provinco, kaj estis plurfoje laŭdita.

# En la sezono de rikolto de pomoj

de Ŝen Pej



## GRANDKVANTA ELDONADO DE LIBROJ EN LA TIBETA LINGVO

En la pasinteco, sub la regado de feŭda servuta sistemo, la eldonado de Tibeto estis ekstreme postĝinta. En la tuta regiono troviĝis nur kelkaj malgrandaj metiejoj kiuj presis sutron kaj superstiĉajn paperojn per lignaj presplatoj. En la jaro 1959, post

la demokratia reformado de Tibeto, diversnivelaĵ registaraj institucioj kulturis grandan nombron da studantoj, tradukistoj kaj verkistoj de la tibeta lingvo por vaste apliki tiun lingvon parole kaj skribe. En la Granda Proleta Kultura Revolucio stariĝis la Tibeta Popola Eldonejo kaj Hinhua-presejo de Tibeto kaj en diversaj gubernioj respektive stariĝis Hinhua-librejo kaj librovendaj fakoj en butikoj. Ekde la jaro 1972, Tibeto jam eldonis ĉirkaŭ 100 tibetlingvajn verkojn kun totala eldonkvanto de pli ol 4,000,000 ekzempleroj kaj distribuis pli ol 6,000,000 diversajn tibetlingvajn librojn.



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj  
Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

---

N-ro 10 (207) 1975

---

## Ĉefa Enhavo

Reformo de ĉinaj lokaj operoj . . . . .	1
Servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj dum la tuta vivo . . . . .	6
“Teatra trupo kun portvektio” . . . . .	10
Riĉa rikolto de someraj grenoj en Ĉinio . . . . .	16
Elektrizado de la Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo . . . . .	19
Kampara aĉeta kaj disvenda kooperativo . . . . .	23
Novaj rimedoj por kuraci brulvundon . . . . .	29
Senhalte sur la revolucia vojo . . . . .	33
Serĉi perdintojn . . . . .	37
La dungŝjang-oj . . . . .	41




# Granda hidroelektrejo konstruita en Fugian



Fera turaro de altensiaj linioj de 220.000 voltoj

Finiĝis la konstruado de la unuaj 4 ŝtupoj de la Gutianhi-a Hidroelektrejo, la plej granda de sia speco en Fugian-provinco de Ĉinio. Ĝi situas en Vuĵi-montaro, kaj per la torenta rivero produktas potencon kurenton por industria kaj agrikultura produktado de la urboj Fuĝou, Nanping, Sanming kaj Jong-an kaj la regionoj de Ningde, Gianĵang kaj Putian. Ĝia funkciado ludas gravan rolon en prosperigo de la ekonomio de tiu orienta provinco de Ĉinio.

La ekipaĵoj de la elektrejo estas projektitaj, fabrikitaj kaj instalitaj de ĉinaj laboristoj. La nuna kapacito de la stacio estas pli-ol-40-oblo de la totala kapacito de Fugian antaŭ la Liberiĝo.




La barajo de la  
kvaraŝtupa elektrejo

Ĉivej-komunumo de  
la urbo Fuĝou iriga-  
cias kampojn per  
elektro.









La supra dekstre:  
Ĉefaj maŝinoj en la  
unuaŝtupa elektrejo

La centra kontrolejo



# La unua urbeto ĉe la fonto de



Kjumalaj


Kjumalaj — dezertejo ĉe la suda piedo de Bajan-Kara-montaro — jam fariĝis prospera urbeto en paŝtejo de Kinghaj-provinco de nordokcidenta Ĉinio. Situate je 4,500 metroj super la marnivelo, ĝi estas la unua urbeto aperinta ĉe la fonto de Jangzi, la plej longa rivero de Ĉinio.

Ekde 1953, liberigitaj tibetnaciecaj popolanoj komencis konstrui tiun urbeton sur paŝtejo. Nun en tiu nova urbeto troviĝas fabrikoj, lernejoj, magazeno, banko, poŝta kaj telekomunika oficejo, meteostacio kaj kinejo, kaj ĝi fariĝis politika, ekonomia kaj kultura centro de la gubernio Kjumalaj.

Antaŭ la Liberiĝo, la lokaj tibetnaciecaj paŝtistoj multe suferis de subpremado kaj ekspluatado de la brutposedaj mastroj kaj reakciaj regantoj. Post tutjara laboro por la mastro paŝtisto povis ricevi nur kelkajn ŝafojn kiel laborpagon, kaj tiam unu ŝafon oni povis interŝanĝi nur kontraŭ unu futo da kotono. Nun la tuta gubernio havas 1,200,000 diversspecajn brutojn, kaj ĉiu paŝtisto havas meznombre ĉ. 100, t.e. sepoblon de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. De la gubernia urbo Kjumalaj oni povas atingi iujn komunumojn kaj brigadojn per aŭto kaj la komerca reto etendiĝanta de la urbo ĝis la paŝtejoj alportas multan oportunon al la paŝtistoj.



# Jangzi



Tibetnaciecaj paŝtistinoj elektas ŝtofon en butiko

La gubernio Kjumalaj starigis nombrojn da lokaj entreprenoj inkluzive de riparejo de paŝtaj maŝinoj kaj elektrejo. Jen la tibetnaciecaj laboristoj en laboro.







Paŝtado sur  
neĝa monto



Kjumalaj sur alta  
kaj frosta regiono  
konstruis grandan  
nombron da forcejoj  
en la lastaj jaroj por  
kulturi freŝajn lego-  
mojn de multaj spe-  
coj.

# Ĉe la bordo de Ĉiŝuj-rivero




Plukado de te-folioj

Laborejo de pakado de la fabriko de alkoholaĵo Maŭtaj



Sterkado



Inter la montoj ĉe la limo de niaj provincoj Junnan, Gujĝou kaj Siĉuan torentas rivero Ĉiŝuj je pli ol 500 km. longa, kiun kvarfoje transpasis la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo gvidata de Prezidanto Maŭ Zedong en sia Longa Marŝo.


La rivero estas mallarĝa kaj tre zigzaga kaj havas danĝerajn rifojn. Antaŭ la Liberiĝo, la ambaŭborda kamparo estis ofte plagita de trosekeco kaj inundo kaj la tiea popolo vivis en ekstrema malriĉeco kaj postiĝinteco. Post la Liberiĝo, disvolvante la gloran tradicion de la Ruĝa Armeo peneme lukti kontraŭ malfaciloj kaj imitante la ekzemplon de la Daĝaj-anoj, la komunumanoj tie konstruis kampojn sur montoj kaj energie faris akvoutiligan konstruadon dishakante montojn, dank' al kio la malnova postiĝinta fizionomio estis ŝanĝita. Nun tie ŝtuparaj kampoj kuŝas unuj super aliaj, kanaloj murmuris kaj montdeklivoj estas plene kovrataj de florantaj fruktaroj. Ĉe la pramejo estas monto Kinggango, kie la Ruĝa Armeo faris intensan batalon siatempe. Tie sur la montodeklivo troviĝas produkta taĉmento Gianŝan, kiu akiris riĉan rikolton jaron post jaro malgraŭ trosekeco kaj inundo kaj kies pomua produktokvanto de greno jam superis 500 kg. En la pasinta jaro ĝi ankoraŭ akiris riĉan rikolton en trosekeco kaj fariĝis unu el la avangardaj unuoj de la provinco Gujĝou en lerno de Daĝaj.

Dank' al disvolviĝo de la surakva transportado de Ĉiŝuj-rivero, nova ŝanĝo okazis al ĝiaj havenoj. Tie konstruiĝis ŝipfarejo, fabrikoj de kemia sterko kaj sukero, magazenoj, lernejoj kaj loĝdomoj. Kaj la urbetoj kun pramejoj jam fariĝis nun novaj prosperaj socialismaj urbetoj kun disvolviĝantaj trafiko kaj produktado.

Sur la dorskovrilo:

Tuĉeng, la pramejo kie la Ruĝa Armeo unuafoje transveturis la riveron Ĉiŝuj siatempe

Fabriko de nitrogena sterko de la gubernio Ĉiŝuj, kiu povas produkti tri mil tunojn da sinteza amoniako ĉiujare





12859

